

# EL POPOLA ĈINIO

中國報

10  
1999

ISSN 0032 - 4361

Kelkaj fragmentoj de la 84-a UK

**Cina vivo en la pasintaj  
50 jaroj**

Tra la kanjono de Yarlung Zangbo



Florplanto

de Y. MURAMATU (Japanio)

La apero de la deka numero de 1999 de nia revuo koincidas kun la 50-jara jubileo de la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Kelkaj artikoloj kaj bildserioj en ĉi tiu numero konigas al vi la ŝanĝiĝojn de la ekonomia konstruado kaj la popola vivo de Ĉinio en la pasinta duonjarcento. Ili estas "Ĉina vivo en la pasintaj 50 jaroj", "Ŝanĝiĝoj en 50 jaroj (III)", "Nova aspekto de la antikva ĉefurbo" kaj "Scenoj en urbo". Ĉiuj ŝanĝiĝoj en la pasintaj 50 jaroj de Ĉinio kun tiel granda loĝantaro vekis la atenton de la mondo, kaj por la ĉina popolo la ŝanĝiĝoj estas "mondskuaj". Kompreneble la ĉinoj ne povas fariĝi riĉuloj en mallonga tempo, sed ili jam ne plu suferos tiajn mizerojn, kiajn spertis la malnovaj generacioj. Kaj la plej grava afero estis, ke la ĉina popolo forskuis la tri grandajn "montojn" premantajn sur ilia kapo, nome imperiismon, feŭdismon kaj burokratan kapitalismon. La liberigita popolo mastris sian sorton kaj komencis krei novan vivon kun entuziasmo de la mastro de la ŝtato. De tempo al tempo nia gazeto raportis pri tio. Sed kompreneble, ĉu nun, ĉu en la pasinteco, ni komparis niajn sukcesojn kun la antaŭa bazo de nia lando. Kompare kun la evoluintaj landoj, la diferenco inter ni kaj ili estas tre granda, kaj ni devas iri longan vojon.

Per kelkaj vortoj ni menciuj aliajn du artikolojn. Unu estas "Tra la kanjono de Yarlung Zangbo". Iuj prenas la trovon de la kanjono kiel eksterordinaran eventon en la scienca esplorado de Ĉinio. La medio, vasteco kaj imponeco de la kanjono ŝajne superis tiujn de la aliaj kanjonoj en la mondo. Nun oni ankoraŭ ne povas fari klaran konkludon pri la valoro kaj signifo de la trovo, sed iuj homoj jam intencis turismi aŭ ekspedicii en la kanjono. Por koni la aspekton de la kanjono, ĉinaj sciencistoj multe suferis batalante kontraŭ diversaj malfaciloj. La alia artikolo "Atesto de bronza historio" konigis al vi pri la abundaj bronzaĵoj antaŭ pli ol miloj da jaroj kaj antikva kulturo de Hubei-provinco.

La Red.

# El Popola Ĉinio

10 [493] 1999



Sur la Granda Muro

Foto de Niu Xiwu

La Granda Muro kun totala longeco de 6 700 kilometroj estas unu el la grandiozaj konstruaĵoj de Ĉinio. Ĝi altiras multajn vizitantojn, inter kiuj troviĝas ankaŭ tiuj, kiuj venas el aliaj landoj por ĝui ĝian imponecon kaj pejzaĝojn en ĝia ĉirkaŭaĵo.

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"

Direktoro: Wang Xifu  
Adreso: P.O. Kesto 77,  
Beijing 100037, Ĉinio  
Telefono kaj telefakso:  
+86-10-6832 1808

Retpoŝto:


epc@china-report.com

Hejmpaĝo:

<<http://www.china.org.cn/ElPopolaCxinio>>

# ENHAŬO

- |  |   |
|--|---|
| <p>2 <b>INTER NI</b></p> <p>4 Ĉina vivo en la pasintaj 50 jaroj</p> <p>7 Homo amema kun koro ĉiam juna</p> <p>10 <b>ĈINAJ E-ISTOJ:</b><br/>Verda stelo brilas sur alt-ebenaĵo</p> <p>12 <b>ORIGINALE VERKITAĴJ:</b><br/>Afanti (Poemoj)</p> <p>13 <b>POR KOMENCANTOJ:</b><br/>Por gustumi vinberojn</p> <p>14 <b>ESP-NOVAĴOJ</b></p> <p>15 Subtenu kaj flegu Rondon Familian</p> <p>16 Kelkaj fragmentoj de la 84-a UK</p> <p>20 Vizito al Makao (III)</p> <p>21 Nova aspekto de la antikva ĉefurbo</p> <p>24 <b>SERĈO DE SHANGRILA:</b><br/>Kostumo, loĝdomo kaj ligna bovlo</p> <p>28 Tra la kanjono de Yarlung Zangbo</p> | <p>33 Scenoj en urbo</p> <p>36 <b>EKONOMIE:</b><br/>Ŝanĝiĝoj en 50 jaroj (III); Kurantaj aferoj; Privataj entreprenoj en Ĉinio</p> <p>38 Arta klerigo pli grava</p> <p>40 <b>TEMO PROPONITA DE LEGANTOJ:</b><br/>Saĝo en kvieto</p> <p>42 <b>JUNULARO:</b><br/>Kiel ĉinaj junuloj impresis ilin</p> <p>44 <b>MULTNACIA ĈINIO:</b><br/>Geedziĝaj moroj de ĉinaj naci-malplimultoj</p> <p>46 <b>EL ĈINAJ GAZETOJ</b></p> <p>48 Atesto de bronza historio</p> <p>50 Li teksigas silkraŭpojn</p> <p>51 <b>ĈINAJ METIARTAĴOJ:</b><br/>Taoisto sur floso</p> <p>2 <b>FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ:</b><br/>Florplanto</p> <p><b>SUR LA DORSKOVRILO:</b><br/>Akvofalo de Huangguoshu</p> |
|--|---|



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- |                          |                   |
|--------------------------|-------------------|
| 1. Makao (p. 20)         | 4. Xi'an (p. 46)  |
| 2. Qinghai-prov. (p. 10) | 5. Tibeto (p. 28) |
| 3. Wuhan (p. 48)         |                   |



Geedzoj Jia kaj iliaj gefiloj, genepoj kaj gepranepoj

# Ĉina vivo en la pasintaj 50 jaroj

de PANG NAIYING

**E**STAS agrable, se vi amikiĝas kun kelkaj maljunuloj en Pekino, kaj sidante en ilia korto kaj trinkante teon, aŭskultas iliajn rakontojn pri ilia infaneco. Iu diris, ke la praavo de lia praavo jam vivis ĉi tie kaj tiam Pekino ne estis tiel granda kiel nun kaj ĉi tie ne estis tiel multe da domoj kaj veturiloj. Alia diris, ke lia avo kune kun li vizitis teatron. Neniu sciis tiam, kio estas televido, kaj oni ĉiam kontente ĝuis operon en teatro. Tria diris, ke ifoje li kune kun la patro iris eĉ 15 km por aĉeti kandizitajn kratagfruktojn... Ili senĉese rakontis kaj la apudstarantaj kun intereso aŭskultis. Foje mi notis la rakontojn kaj nur tiam mi konsciis, kiel enhavoriĉaj kaj valoraj estas tiuj rakontoj.

Iliaj rakontoj estas simplaj kaj koncernas nur la

ĉiutagajn aferojn, tamen ili spertis multe. Se vi ligas iliajn vivspertojn kaj ĉiujn bagatelojn, vi trovos, ke en ili estas multe da aferoj, kiuj nedisigeblas de tiu ĉi urbo, de tiu ĉi lando, kiu nutris ilin.


## PRINTEMPA FESTO

Mi vizitis ilin antaŭ la Nacia Festo, t.e. la 1-a de oktobro 1999, la 50-a datreveno de la naskiĝo de la Ĉina Popola Respubliko. Maljunulo Jiang Hang rakontis al mi pri la Printempa Festo.

“En la infaneco mi forte deziris la Printempan Feston. Mia patro diris, ke estas malfacile por ni malriĉuloj pasigi la feston, tamen mi ankoraŭ ŝatis la feston. En la ordinaraj tagoj ni vivis mizere kaj en la Printempa Festo ni havis bongustajn manĝaĵojn, ĉar la Printempa Festo estas plej grava por la ĉinoj.” Li daŭrigis: “Ni festas ĉiujare la Printempan Feston,

sed ni neniam forgesos la Printempan Feston de 1949, ĉar tiujare ĉinoj liberiĝis. Tiam stariĝis la ĉina popolo kaj por ĉiam forpasis la jaroj, kiam eksterlandanoj laŭvole tiranis la ĉinan popolon kaj ĉe la pordo de ĉinaj parkoj pendis ŝildo kun la vortoj 'Estas malpermesite eniri por la ĉinoj kaj hundoj.' De 1949 la imperiistoj ne plu rajtas laŭvole mortigi, bruligi kaj postuli de Ĉinio koncesion kaj kompenson... Tiun Printempan Feston ni pasigis kontente, kun bona humoro. Tiutage ni salutis unu alian tiel: 'Finfine la mizero for!' Antaŭe laŭ la malnovaj moroj virinoj ne povis eldomiĝi, sed tiun tagon ili samkiel la viroj dancis kaj kantis eksterdome."

Antaŭvespere de la festo oni laŭkutime preparis *ĝjaŭzi*-ojn. Ĉar mankis viando, la knaboj estis iom malbonhumoraj, kaj la gepatroj do konsolis: "Ni estos pli feliĉaj en la venonta jaro." En la 50-aj jaroj la vivo estis multe pli feliĉa ol antaŭe, tiam ĉiuj familioj havis viandon, kokon kaj fiŝon. Manĝinte bon-



Jia Yu, lia edzino kaj iliaj infanoj en la 50-aj jaroj

gustajn pladojn, oni pasumis en foirejo, kie vendiĝis diversaj pekin-gustaj etmanĝaĵoj, sekaj fruktoj, diversaj ludiloj, kiaj kajto, argila pupo kaj tola tigreto. Tie estis ankaŭ ĵonglado...

En la 60-aj jaroj la ĉina loĝantaro kreskis rapide, kaj la landon atakis naturaj katastrofoj dum 3 jaroj, pro kio oni havis materialan malfacilegon. Kvankam oni aĉetis multajn objektojn per kuponoj, tamen oni ankoraŭ deziris la Printempan Feston, ĉar por la festo oni havis pli da kuponoj por oleo kaj viando kaj ankaŭ povis havigi al si fajnajn farunon kaj rizon, sunflorajn semojn, arakidon, bombonojn k.a.

La malfacilo daŭris ĝis la fino de la 70-aj jaroj. Ĉinio turnis la atenton sur la ekonomian konstruadon kaj komencis praktiki la politikon de pordmalfermo kaj reformado. En la 80-aj jaroj la materia vivo fariĝis pli kaj pli bona, dume la diversaj kuponoj

estis ne plu uzataj. Oni povis havigi al si ĉion, kion oni deziris. Oni diris, ke la loĝantoj pasigas ĉiun tagon kvazaŭ la Printempan Feston, sed en la tago de la festo ili ne sciis, kion ili preferas. Ĉiuj familioj ekhavis fridujon kaj lavmaŝinon kaj la dommastroj ne plu ĉagreniĝis pro putro de la superfluaĵoj kaj malforto antaŭ multe da malpuraj vestoj. En la malnova Ĉinio nur en la Printempa Festo la infanoj havis novajn vestojn, sed nun ili ĉiuj estas dorlotataj de la gepatroj kaj havas multe da novaj vestoj. En 1983 la ĉinoj ekhavis novan ĝuon, t.e. spekti la Amuzan Vesperon de la Printempa Festo elsendatan de televido, prepari *ĝjaŭzi*-ojn kaj maldormi la tutan nokton por bonvenigi la novan jaron.

En la 90-aj jaroj la ĉinoj havas pli kaj pli plezurajn vivon. Multaj ĉinoj ĝuas familian festenon en restoracio, telefone salutas anstataŭ vizito kaj sendas novjarajn salutvortojn per reto... Kaj la plej modernaj salutvortoj estas "Sanon kaj longan vivon!" Pli kaj pli da homoj ludas bovingon en sporthalo, ĝuas muzikon en koncertejo, faras ekskurson... Iu ĉiĉerono diris, ke en la Printempa Festo de 1995 lia familio vojaĝis al la bela tropika arbaro en Xishuangbanna, Yunnan-provinco. Antaŭe oni elspezis ĉefe por manĝado, sed nun la koncepto ŝanĝiĝis kaj oni elspezas ĉefe por amuzoj.

## FORGESITAJ LABOROJ

La 86-jara maljunulino Wen Xin vivis jam 55 jarojn en Baizi-strateto. Nun ŝiaj genepoj sin okupas pri preparo de reklamoj, disvolvo de softvaroj, oferto de asekuro, anonco de TV-programo k.a. Pri tio la maljunulino diris: "La epoko ŝanĝiĝis kaj modiĝis ankaŭ la profesioj, kiujn ni ne sciis antaŭe."

Wen Xin naskiĝis en riĉa familio. Kvankam ŝi lernis en la infaneco kaj estas lerta en verkado de poemoj kaj prozaĵoj, tamen la tutan vivon ŝi mastumas la domon. Ŝi diris, ke en tiuj jaroj al Ĉinio mankis naciaj industrio kaj komerco kaj estiĝis edukado, scienco kaj tekniko. Ŝia edzo, unu el la plej fruaj ĉinaj elektraj inĝenieroj, studis en Francio, kaj reveninte en Ĉinion, li povis projekti nur cementan stangon por transsenda lineo, la plej fruan en Ĉinio. Koncerne la neklerigitajn najbarojn, ili laboris aŭ kiel kulio aŭ kiel kolportisto.

La avo de Liu Mu siatempe estis rikiŝisto. Kaj en la ventaj kaj en la pluvaj tagoj li devis kurete transporti klientojn. Tiam en Pekino vivis 2-3 milionoj da loĝantoj kaj estis nur 6 tramvojoj, tial la riĉaj veturis ĉefe per rikiŝo, dum la malriĉaj piediris. Tiam en Pekino estis specialaj transportistoj de karbaj buloj, ĉar ili ĉiam estis nigraj de la laboro, tial oni nomis ilin karbaj nigruloj.

Wen Xin diris al mi, ke antaŭ duonjarcento en Pekino estis tre malmulte da akvotuboj kaj tiam en ŝia strateto estis nur unu akvokrano, kiu estis en ŝia

hejmo, dum aliaj devis aĉeti trinkakvon. Tiam estis specialaj laboruloj, kiuj transportis akvon el rivero kaj vendis ĝin al loĝantoj. Tiu laboro estis peza, tamen pli bona ol feko-transportistoj, kiuj plejparte estis bankrotintaj kamparanoj, migrantaj en Pekinon. Ili ĉiam kun peza sitelo sur la dorso purigis necesejojn en Pekino. Tiam estis ankaŭ aliaj laboruloj, kiuj flikis vestojn, riparis difektitajn bovlojn kaj potojn, aĉetis kaj vendis malnovajn litkovrilojn — tiam post vintro iuj malriĉaj familioj estis devigitaj tuj vendi la vatitajn litkovrilojn por vivrimedoj kaj aŭtune aĉetis malnovajn vatitajn litkovrilojn por pasigi vintron.

En la malantaŭa strateto vivis malriĉa vidvino-flikistino. Ŝi mem uzis la kolektitajn vestojn kaj ŝia filo kolektis ne plene konsumitajn karbajn bulojn, kiujn ŝi vendis kontraŭ iom da moneroj. Multaj knaboj en la strateto kolektis tiajn karbajn bulojn.

Tiam multaj migrante laboris sur strato: barbiroj, merceristoj, ĉifonistoj, akriĝistoj de tondiloj kaj tranĉiloj... Ili kriis por allogi klientojn kaj en ilia krido sentebliis tristo. Tiu sceno estis longe vidata en la urbo. Wen Xin diris, ke ankaŭ tiuj migrantaj laboruloj estis bankrotintaj kamparanoj. Nun estas tre mal-

multe da homoj, kiuj mem tajloras, tial oni ne bezonas akriĝistojn de tondiloj kaj tranĉiloj. Kaj hodiaŭ oni tre hazarde renkontas tiajn homojn, kiuj facile rememorigas pri la pasinteco.

Wen Xin rakontis al mi pri la posteuloj de siaj malnovaj najbaroj: "Ili ĉiuj bone laboras. La maljuna batatobakisto havas tri nepojn kaj du el ili nun studas alilande kaj la tria estas lerta kuiristo. Nepo de la flikistino laboras en eksterakomerca departemento kaj posteulo de la rikiŝisto nun estas taksiisto..."

## NOVA VIVO

Maljunulo Jia Yu rakontis al mi sian familian historion. Sen lia konigo eble neniu sciis, ke li, laboranta en la centro de dokumentoj kaj informoj sub la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, iam servis en armeo: En la tempo de la nacia krizo li, sangvina junulo, havis nenion alian rimedon krom forlasi la

studon kaj militistiĝi.

"Mia unua filino naskiĝis en la milita jaro 1943, kiam mia edzino kuris jen tien jen ĉi tien por eviti militfajron. Post akuŝo ŝi ĉiunokte dormis sen demeti vestojn por povi kiel eble plej rapide forkuri en aeratako. Tiam en nia kofro estis ekskluzive urintukoj..." Poste, kiam denove kuniĝis la geedzoj, la edzino ploris, plendante, ke la edzo ne prizorgis la familion.

"Ĉu la familio povas esti sekura, kiam la landon minacas pere?" Jia Yu forte malamas la militon kaj deziras pacon. Li diris, ke post naskiĝo de la nova Ĉinio li ekhavis familion en la vera senco. Poste li ekhavis pli da infanoj, ankaŭ kiuj edziĝis aŭ edziniĝis kaj havas infanojn. Post naskiĝo de la nova Ĉinio lia familio iam havis 19 membrojn. "Ni loĝas ankoraŭ en la malnova domo. Ĝi estas malgranda, tamen ni

vivas feliĉe. En la granda familio ĉiam estas granda harmonio," li diris.

Li ofte diris al siaj infanoj: "Antaŭe, kiam nia patrujo estis minacata de danĝero, la familianoj disiĝis, kaj post liberiĝo la loĝkondiĉoj estas portempe malbonaj, tamen la vivo stabila. Mi estas memfida venki la malfacilojn kaj krei novan vivon." Li diris ankaŭ, ke la familia harmonio utilas al kreskado de

la infanoj. Ili finis sian studon en universitato kaj iuj el ili daŭre studis kiel esplor-studentoj. Nun ili fariĝis inĝenieroj aŭ profesoroj. S-ro Jia estas kontenta pri ĉio ĉi tio.

5 el la gefiloj de Jia poste aĉetis grandan loĝdomon. Ili ofte vizitas siajn gepatrojn kunportante diversajn manĝaĵojn. Ili diris: "La sano kaj longa vivo de la gepatroj estas nia feliĉo." Por pliiĝi la koheremon de la familio gesinjoroj Jia ĉiujare okazigas familian artan festivalon. Tiam ĉiuj familianoj faras fotadon, papertondadon, pentradon kaj kaligrafadon por la familia konkurso. En la tago, kiam mi vizitis la familion de Jia, li skribis grandan ideogramon kun la signifo de familio kaj poste ĉiuj aliaj familianoj skribis la saman ideogramon kaj fine ili kune kantis "Feliĉa familio plena de amo".

Jia diris, ke kie estas amo, tie estas harmonio kaj paco; kiel statas la familio, tiel statas ankaŭ la lando kaj la tuta homaro. ■



Geedzoj Jia kaj ilia dua pranepo

# Homo amema kun koro ĉiam juna

Teksto de PANG BIAN

Fotoj de LING YOUJUAN

**E**N sunbrilo, rememorante la pasintaĵon, la 90-jara Zhang Yunhe verkas artikolojn per komputoro por la familia gazeto "Akvo". Kiam la rememoro transformiĝas en verkaĵon, ŝi ŝajne rejunigiĝas.

Ŝi havas belan aspekton. Ŝi portas malhele verdan veston kaj nigran veŝton, kun longa blanka hararo volviĝanta sur la kapo. Se ŝi kantas *kunĉju* (opero naskiĝis en Jiangsu-provinco en Yuan-dinastio), ŝi montriĝas pli eleganta.

Homa vivo similas al guto da akvo, kiu devas flui en riveron kaj poste en maron, kaj nur tiam ĝi neniam sekiĝos. Antaŭ 70 jaroj kvar senafektaj knabinoj en familio Zhang fondis la gazeton "Akvo",

konkurantan kun la gazeto de la ses fratoj. Rezulte la belaj artikoloj de la knabinoj altiris la knabojn.

En "Akvo" la plej kortuŝa vorto estas amo al la patro, kiu estis prudenta kaj malamis la neegalecon de klerigo inter viroj kaj virinoj en la feŭda socio, kiu pledis, ke virinoj neklerigitaj estas moralaj. Li venigis instruistojn al sia hejmo por la knabinoj, kiuj lernis kune kun la knaboj la ĉinan lingvon, matematikon, historion, geografion... kaj eĉ bicikladon, naĝon kaj ludon de korbopilko kaj futbalo. La patro disvastigis tian amon al la tuta socio: fondi mezlernejon por knabinoj kaj kuraĝigi ilin havigi al si modernan edukadon. Li ŝatis aĉeti kaj legi librojn, kaj aŭskulti muzikon. En la legoĉambro ofte aŭdiĝis kantoj el gramofono.

Ĉiu filino en la familio Zhang estas talenta. Kvankam la patro mortis en mezaĝo, ne povante akompani siajn filinojn iri pli longan vivovojon, tamen la

Zhang Yunhe





Zhang Yunhe (la dua de dekstre)  
kaj ŝiaj gefratoj en infaneco.



Zhang Yunhe lernanta de sia edzo tajpadon



Ŝi bezonas inhali iom da oksigeno  
en laborplenaĵoj tagoj.

filinoj kaj iliaj edzoj fariĝis eminentaj intelektuloj. Inter ili Zhang Yunhe bone konas metrikon kaj ŝia edzo Zhou Youguang estas lingvisto.

Ĉar la gefratoj disiĝis pro malstabila situacio, la monata gazeto "Akvo" paŭzis post la 25-a numero. En 1995 Zhang Yunhe proponis, ke la dek gefratoj kaj iliaj parencoj daŭrigu la gazeton. Ŝi prenis la vortojn de Shen Congwen, la edzo de ŝia fratino, kaj granda literaturisto, kiel enkondukon: ni ŝatas la virton de akvo, ĉar ĝi akceptas ĉion kaj ekskluzivas nenion.


La disigitaj familianoj renkontiĝas en la familia gazeto, kie ili interparolas kaj rakontas siajn 70-jarajn travivaĵojn per poemoj, eseoj, tagnotoj kaj leteroj. Ankaŭ publikiĝas kaligrafiaĵoj, pentraĵoj, kantotekstoj kaj vakstinkturaĵoj. Preskaŭ ĉiu kovrilpaĝo rilatas kun akvo: elakviĝinta lotuso, inversa bildo de bambuo en akvo aŭ domo apud ponteto. Antaŭe "Akvo" estis por la familianoj mem kaj nun ĝi fluas en cen-

ton da familioj kaj animas ilin.

S-ino Zhang denove prenis plumon. Ŝi rememoras la fidelan amon de s-ro Shen Congwen kaj ŝia fratino, remaĉas amĵuron de ŝi mem kaj ŝia edzo ĉe Huangpu-rivero en Ŝanhajo: blua ĉielo, dolĉa akvo, kontenta homo kaj milda ŝtono. Nun ondoj ankoraŭ ruliĝas, kaj la geamantoj fariĝis maljunuloj kun elprovita amo. Kiam ŝia artikolo aperis en la gazeto, ĝi vekis admiron ĉe junuloj.

"Akvo" igas signifoplena la vivon de la maljuna geedza paro. S-ino Zhang redaktas kaj distribuas, kaj ŝia 93-jara edzo respondecas pri desegnado. Ili venkis ĉiujn malfacilojn. S-ino Zhang estis dufoje operaciita pro katarakto, tamen ŝi eklernis komputoran manipulado, kiam ŝi aĝis 86 jarojn. Ŝi havas gravan koran malsanon. Multaj kuracistoj, kiuj antaŭdiris, ke ŝia vivo nelonge daŭros, ne transvivis ŝin. Kial? Ŝi diris: "Homo amema kun koro ĉiam juna." ■





Brošurado de la gazeto "Akvo"

# Verda stelo brilas sur altebenaĵo

de JIA WENDE

**J**AM en la infaneco mi deziris lerni fremdan lingvon. Najbare de mia hejmo estas Tar-templo, tre fama en Qinghai-provinco, kiu allogis alilandajn turistojn. Je tio mi pensis, ke certe ekzistas tute malsama mondo kaj, ellerninte fremdan lingvon, oni povas koni tiun vastan mondon. Siatempe, kune kun junaj kolegoj mi ofte parolis kelkajn fremdlingvajn vortojn sporade lernitaj. Tio alportis al mi grandan plezuron.

En la aĝo de 17 jaroj mi eklernis la anglan lingvon en la Pedagogia Kolegio Huangzhong, sed mi neniam atendis, ke post mia kontaktiĝo kun Esperanto ŝanĝiĝis mia decido fariĝi instruisto de la angla lingvo.

Artikolo pri esperantisto-poeto Armand Su publikigita en ĵurnalo kortuŝis min kaj pro tio naskiĝis en mi la ideo lerni Esperanton. Poste, informiĝinte de ĵurnalo pri koresponda E-lernejo, mi kaj miaj 5 kunlernantoj nin anoncis al ĝi. 3 monatojn poste, ni ricevis lerno-materialojn kaj leteron mallongan, sed kuraĝigan. Laŭ la Internacia Alfabeto mi ellernis la 28 Esperantajn literojn nur en 20 minutoj. En la sekvanta mateno ni salutis en Esperanto: "Bonan matenon!" Tio okazis en 1978, kiam mi estis 20-jara. Hodiaŭ mi ankoraŭ pasie amas Esperanton kiel antaŭe.

Mi ege fieras, ke dank' al mia

klopodo dum la pasintaj 20 jaroj esperantistaro de Qinghai-provinco multe pligrandiĝis. Multaj Qinghai-anoj ne scias mian nomon, sed konas min pro tio, ke mi laboras por Esperanto. Kiel fervorulo, mi ege aprobas la diron, ke la per-



Jia Wende (dekstre) kaj Zhang Qicheng, lama ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo

spektivo de Esperanto dependas de esperantistoj. Retrorigardante miajn Esperantajn travivaĵojn, mi elmetas ĉi-sube miajn opiniojn pri Esperanto kun espero diskuti kun samideanoj ĉinaj kaj alilandaj:

A. La lingva nivelo de esperantistoj rilatas rekte al la praktika valoro de Esperanto kaj disvolviĝo de E-movado.

Se esperantistoj ĉiam kontentiĝas nur pri sia baza nivelo, Esperanto restos senutila kaj E-movado ne povos progresi grandpaŝe.

Ellerninte la elementan lernolibron, mi tuj organizis 7-personan memlernan grupon por unuflanke konigi Esperanton al pli multaj homoj kaj aliflanke uzi Esperanton, kiun mi lernis. Pro manko de fonetikaj materialoj mi ankoraŭ ne povis certigi jam du jarojn post mia lernado, ĉu mia prononco estas ĝusta. Somere de 1982, mi kaj miaj du kolegoj veturis pli ol kvin horojn per aŭtobuso por viziti la Lanzhou-an E-Asociacion en la najbara provinco Gansu. Tie la sincera kaj afabla saluto en Esperanto tuj forpelis nian lacon kaj dubon dum pluraj tagoj. Laŭdo de veteranaj esperantistoj firmigis nian volon bone lerni Esperanton.

Hejmen reveninte, mi preparis E-kurson. En la vintro de la sama jaro ekfunkciis la unua E-kurso de Qinghai. Ĝis hodiaŭ, 800 personoj lernis Esperanton en 11 kursoj. Intertempe ni eldonis E-periodaĵon "Herbo sur Altebenaĵo".

Dum la funkciigado de kursoj kaj eldonado de la periodaĵo mi profunde sentis, ke tio, kion mi lernis, ne sufiĉas por mia E-laboro. Pro tio, mi ĉesigis ĉiujn laborojn kaj veturis du tagojn per trajno al Pekino por viziti la Ĉinan Esperanto-Ligon. Ĝia konstanta komitatano Hou Zhiping akceptis min,

konigante al mi la ĉinan kaj alilandajn E-movadojn. Li ne nur donacis al mi ekzemplerojn de "El Popola Ĉinio", sed ankaŭ donis konsilojn pri plibonigo de E-laboro en mia provinco.

Finlerninte lernolibrojn alportitajn el Pekino, mi starigis sinsekve la Xining-an Postlaboran E-lernejon kaj la Qinghai-an Filion de la Ĉina Koresponda E-Instituto. En 1986 mi kaj televida stacio kune faris Televidan Elementan E-kurson, t. e. la unuan E-instruan filmon de Ĉinio. La Qinghai-a Televida Stacio telesendis la kurson ĉiutage en ora tempo dum du monatoj. Tiel en Qinghai estis mil esperantistoj kaj naskiĝis la Qinghai-a E-Asocio.

En E-kursoj mi ĉiam emfazis al la lernantoj, ke oni devas diligente studi Esperanton kaj nelonge resti komencanto. Nur kiam oni bone lernas Esperanton, ĝi povas ludi sian rolon en nia reala vivo. En tiuj jaroj, lerninte Esperanton kiel la duan fremdan lingvon, iuj lernantoj sukcesis akiri lektorecon, aliaj fariĝis por-magistriĝaj studentoj kaj mi akiris mezgradan diplomon post E-ekzameno okazigita de ILEI. Pere de Esperanto ni akceptis alilandajn turistojn en Qinghai kaj havigis al ni nemalmultajn amikojn. Tio pruvis, ke

Esperanto estas utila.

B. Por disvastigi E-movadon esperantistoj devas persiste labori.

Ĉar Esperanto estas lingvo ne vaste konata por ĉinoj, esperantistoj ĉiam faris pli multajn laborojn por organizi aktivadon kaj starigi institucion. Kvankam mi akiris iom da sukcesoj dum la pasintaj 20 jaroj, tamen mi multe suferis de maljustaj traktoj kaj iris malglatan vojon. Mi memoras, ke mi, fininte mian lernadon en la Pedagogia Kolegio Huangzhong, prezentis al la koncerna departemento la peticion starigi E-asociacion. La rilata respondeculo, kiu donis grandan atenton al la lernado de junuloj, esprimis aprobon kaj subtenon. Sed en la kunveno oni ne akceptis mian peton pro tio, ke oni ne scias, kio estas Esperanto, kaj diris, ke Esperanto ne utilas kaj ne estas tempo por starigi tian asociacion.

Malgraŭ tio, mi ne forlasis la aferon. Mi plurfoje vizitis la ĉefurbon de Qinghai, por ke koncernaj respondeculoj de la provinco komprenu kaj subtenu nin. Post tio, mi ofte desegnis ĝis profunda punkto afiŝojn por diskonigi Esperanton kaj faris televidajn filmojn kune kun televida stacio por instrui Esperanton en la tuta provinco. Dank' al tio, sur la Qinghai-Tibeta Altebenaĵo pli kaj pli

multaj homoj ekkonis kaj eklernis Esperanton, nia esperantistaro senĉese grandiĝis kaj finfine fondiĝis la Qinghai-a E-Asocio en 1992.

C. E-movado bezonas sindone-majn esperantistojn.

Hodiaŭ pli kaj pli multaj homoj klopodas por ĉasi monon kaj turnas sian atenton al la realo, sed ankoraŭ ne eblas sin riĉigi per Esperanto. Tiuj, kiuj povas sin vivteni per Esperanto kiel Ĉielismo Von, estas tre malmultaj. Precipe tiuj, kiuj volas sin dediĉi al E-movado, devas havi sinoferecon. Alie, estas malfacile persiste teni la standardon de Esperanto.

Dum la pasintaj jaroj mi uzis preskaŭ ĉiujn miajn postlaborajn horojn por propagandi kaj disvastigi Esperanton. Mi elspezis grandan monsumon por vojaĝi al Lanzhou, Pekino, Kunming, Qingdao kaj aliaj lokoj por partopreni kunvenojn de Esperanto. Kaj miaj elspezoj por la E-Asocio kaj E-lernejo estas ankaŭ multaj, tial mi laŭeble ŝparas en la ĉiutaga vivo. Miaj kolegoj kaj amikoj ne komprenas min kaj nomas min stultulo. Kontraŭ tio mi estas indiferenta. Dank' al Esperanto mia vivo fariĝis signifoplena. Mi ege feliĉas kaj kontentas, ke en diversaj lokoj de la mondo estas niaj samideanoj. ■

### **Solvo de la vort-enigmo "Provincoj kaj urboj de Ĉinio"**

Vortoj sur horizontalaj strioj:

HAINAN, FUJIAN, WUSHAN, TIBETO, PEKINO, HARBIN, YUNNAN

Vortoj sur vertikalaj strioj:

ŜANHAJO, SICHUAN, SHAANXI, QINGHAI, GUIZHOU, GUANGXI

### **Solvo de la vort-enigmo "15 ĉefurboj"**

Vortoj sur horizontalaj strioj:

BAGDADO, BERLINO, DUBLINO, KANBERO, LONDONO, DAMASKO, BRUSELO, MADRIDO

Vortoj sur vertikalaj strioj:

BANKOKO, VARSOVIO, BRAZILIO, SANĤOSEO, HELSINKO, PNOMPENO, NUAĤOTO

# Afanti\*

(Poemoj)

de LAŬLUM (Ĉinio)

## 1. La reĝo ĉasis

En bela suna tag' la reĝo ĉasis  
kaj lin brunfela vulpo preter-  
pasis.  
La reĝo ĝin rimarkis kaj ekpa-  
fis,  
sed la celitan beston li ne tra-  
fis.

Ruĝiĝis Lia Majesto pro la fuŝo,  
kaj al Afanti vortis lia buŝo:  
"Unika miso! Sed ne mia kul-  
po —  
tro ruza estas la fripona vul-  
po!"

"La sagoj ĉiam laŭas vian vo-  
lon,  
se plaĉas al vi pafi la popolon.  
Se mil landanojn vi ekcelos  
lerte,  
dek cent el ili trafos tute certe."

## 2. Homaspekta rabobesto

Sinjoro distriktestro  
Ekvidas tra fenestro  
Alvenon de Afanti  
Kaj hastas lin demandi:

"Respondu per sincera vorto.  
Kien vi iros post la morto?  
Ĉu en la Ĉielon?  
Aŭ en la Inferon?"

Afanti ridas, ekparolas:  
"Kien, sinjoro, vi mem vojas?"

Meditas, diras la sinjoro:  
"Amema estas mia koro,

Mi bone servas al popolo.  
Mi certe iros al Ĉielo,  
Kaj tie vivos kun anĝeloj.  
Kio do estas via prefero?"

"Se vi ĉielen vin direktos,  
Do la inferon mi elektos.  
Min vere naŭzas la kunesto  
Kun homaspekta rabobesto."

## 3. Nur en pluvvetero

Afanti jen akceptas homon  
por lue doni sian domon.

"Necesas bona pririgardo  
por mia plua bona farto."

La vir' rimarkis, ke makulo  
T troviĝas supre de iu muro.  
"Ĉu pluvan akvon ĝi tralastas?  
Parolu nepre nur pri vero!"

Afanti diras: "Liko pasas.  
Ĝi likas nur en pluvvetero!"

## 4. Eĉ pli malboniĝos

Ministro venas al la gubernio,  
Kie Afanti vivas, kaj enketas:  
"Anstataŭ la koruptan denun-  
caton,  
Nomumi novan estron ni jam  
pretas.  
Tre gravas por ni via opinio.  
Proponu iun taŭgan kandida-  
ton."

Ĉiuj silentis. Neniu rompi l'  
muton volas.  
Post longa silentado Afanti  
ekparolas:  
"Prefere la krimulo restu sur-  
postene,

Ĉar da riĉaĵoj li akiris jam plene.  
Se iu nova lian lokon prenos,  
Denove skrapu, rabi nin li penos.  
Eĉ pli malbonos la situacio.  
Ĉi tio estas mia opinio."

## 5. Por du azenoj

Foje le reĝo kaj la ĉefministro  
eliris ĉasi por sindistro.  
Afanti devis kune iri laŭ ordo-  
no,  
Por ilin servi dume laŭ bezono.

Ĉiele la ardega suno regis.  
La grasaj viroj baldaŭ ekŝvite-  
gis.  
Do ili siajn robojn tuj demetis,  
Afanti porti ilin anstataŭe pretis.

Ankaŭ la magra viro tuj ekŝvi-  
tis,  
ĉar vere varmis kaj eĉ ne ven-  
tetis.  
La penon de Afanti la sinjoroj  
rimarkis kaj aŭdiĝis ridsono-  
roj.

"Afanti, niaj vestoj estas pezo  
sufiĉa eĉ por un' azeno!"

"Ne ĝustas, Moŝtoj, la parolo,  
Por du azenoj ŝarĝopleno!"

\* En Ĉinio vaste cirkulas rakontoj pri la folkloro heroo Afanti, kies nomo preskaŭ fariĝis sinonimo de saĝo kaj bonkoreco. Laŭ la rakontoj sinjoro Laŭlum verkis pli ol 200 Esperantajn versaĵojn, el kiuj ni prezentas la supr-ajn kvin.

# POR GUSTUMI VINBEROJN

de WANG SHUCHUN

**E**STAS vinberĝardeno kun al-taj muroj ĉirkaŭe. En la ma-tura sezono de vinberoj, vulpo flaris la aromon el la ĝardeno kaj ekscitiĝis. Ĝi estas maljuna vulpo, kiu en multaj jaroj gustumis diversajn vinberojn. Aliaj vulpoj tre respektas ĝin pro ĝia riĉa sperto. Ĝi flaradis kaj konstatis, ke en la ĝardeno estas nova vario de vinbero, kiun ĝi neniam gustumis. Ĝi decidis: "Nepre mi manĝos la vinberojn, alie mi ne foriros."


Ĝi iradis ĉirkaŭ la ĝardeno kaj trovis etan truon. Tamen la truo estis tiel malgranda, ke la besto tute ne povas trairi ĝin. Fine la besto faris "gravan" decidon: nenion manĝi en tri tagoj por maldikigi sin. Pro la vinberoj ĝi nenion manĝis en tri tagoj. Ĝi maldikiĝis — kaj sukcese eniris en la ĝardenon tra la trueto. La vinberoj ja estis la plej bongustaj en la mondo, kaj la vulpo manĝadis tri tagojn.

Ĝi devis eliri. Se venos la mastro, ĝi pereos. Tamen ĝi dikiĝis kaj neniel povis eliri tra la truo. Ĝi devis denove nenion manĝi en tri tagoj.

Antaŭ la plej bongustaj vin-

beroj la vulpo devis manĝi nenion. Kia turmento! Tio estas tute neimagebla por aliaj. La vulpo tamen estis firmvola, ke ĝi vere

maldikiĝis post tri-taga fasto. Elirinte el la ĝardeno, ĝi lacegis tamen kun kontento — ĝi gustumis la novan varion de vinbero. ■



## ĈINIO

● La 8-an de julio 1999 s-ro Chen Yuan, membro de la Patrona Komitato de UEA, honora prezidanto de la Ĉina E-Ligo kaj fama filologo, faris en la redakcio de "El Popola Ĉinio" prelegon titolitan "E-movado — granda provo en la 20-a jarcento". Antaŭ la prelego la ĉeestantoj gratulis lin pro la 81-a datreveno de lia naskiĝo.

● Okaze de la 89-a datreveno de la naskiĝo de s-ro Yao Xueyin (1910-1999), honora vicprezidanto de la Ĉina Verkista Asocio, kaj eldonado de la kvara kaj kvina volumoj de lia historia romano "Li Zicheng", la ĉina societo "Amikoj de Esperanto" faris memorkoverton. S-ro Yao eklernis Esperanton en 1935 kaj aliĝis en 1981 al "Amikoj de Esperanto" fondita de famuloj el diversaj rondoj. Li forte subtenis E-movadon. Sur la memorkoverto legiĝas lia surskribo farita en la aĝo de 83 jaroj: Diverslandaj esperantistoj unuigu por la granda ideo antaŭenpuŝi pacon kaj progreson de la tuta mondo.

## ĈEĤIO

● La 22-an de majo 1999 oka-

zis en urbo Prostejov Esperanta renkontiĝo kun malkovro de memortabulo al la 90-jariĝo de Klubo Esperantista en Prostejov. Inter la 59 partoprenantoj el 15 lokoj estis ankaŭ prezidanto de ĈEA Vlastimil Kocvara kaj prezidanto de Pola Esperanto-Asocio Stanislav Mandrak. Partoprenantoj trarigardis la urbon kun ĝiaj memoraĵoj kaj E-ekspozicion en urba kastelo. En la ekspozicio estis historiaj materialoj el la komenco de E-klubo, 62 gratuloj el 30 landoj al la kluba datreveno, diversaj lernolibroj, vortaroj, libroj, Esperantaĵoj, Esperantaj korespondaĵoj de la klubanoj kaj informoj pri Esperanto. Vespere estis danca programo kun riĉa tombolo. Ĉiuj partoprenantoj estis tre kontentaj. Estis eldonita E-poŝtkarto al la kluba datreveno kun la prezo: unu usona dolaro kun respondkupono. Interesatoj aŭ kolektantoj skribu al: Liska Jaroslav, Sidliste Svobody 19/71, 79601 Prostejov, Ĉeĥio.

(Liska Jaroslav)

## HUNGARIO

● La legenda filmo "Incubus", en kiu rolis William Shatner (tuj

post ekfamigiĝinta kiel Kapitano Kirk en multjardeka serio "Star Trek"), estas relanĉita nun en vidbenda formo parolata nur en Esperanto (kun superskriboj en la angla). Laŭ la diroj, temas pri vere elstara fantasta filmo. Detalojn pri ĝia produktado, sonspecimenon de la forta akcento de la aktoroj (inkluzive de Shatner) kaj la eblecon mendi ĝin oni trovas en la hejmpaĝo <http://www.incubusthefilm.com>.

(James Rezende Piton, Ret-info)

## KOREIO

● La 15-an de majo en Seulo, Koreio, okazis "Tago de Pioniroj", memore al E-poeto Dan Tirinaro (koree: Ghong Sasop 1910-1944). Partoprenis pli ol cent esperantistoj kaj familianoj de Dan Tirinaro. En la evento oni recitis poemojn de Dan Tirinaro kaj vidis eldonon de poemaro "Birdoj sen Flugiloj", partoj (52 el 105 poemoj) de "La Liberpoeto", lia originala verko eldonita en Parizo en 1938. La du-lingva libro estis tradukita de Kim Uson kaj Kim Yocho. Prezidanto Lee Chong-Yeong iniciate inaŭ Koreio kaj elektis Dan Tirinaron kiel unuan pioniron memorendan ĉi-

jare, prioraciis lin dum profesoro So Gil-su detale preparolis pri la poeto kaj lia verko.

(Chongsae Lee)

## UKRAINIO

● Estas eldonita la Ukraina-esperanta vortaro de V. Pacjurko / V. Stanoviĉ. Ĉiuj, kiuj deziras aĉeti ĝin kontraŭ 5 HRN, turnu sin al la eldonisto Vasil Stanoviĉ, Ukrainio, U A - 2 9 3 7 2 0 Drohobicx, Lviva reg., str. P. Orlyka, 3A, Eldonejo "Bona koro". (Ukrainia Esperanto-Asocio)



Esperanta renkontiĝo kun malkovro de memortabulo al la 90-jariĝo de Klubo Esperantista en Prostejov

# Subtenu kaj flegu Rondon Familian

de AMRI WANDEL (Israelo)

**M**I estas la nova gvidanto de Rondo Familia. Mi iom hezitis “heredi” tiun taskon de Renato kiu fondis kaj vartis RFn dum multaj jaroj. Nun Renato sentas ke liaj infanoj jam tro aĝas, kaj petis min transpreni tiun rolon. En tiu okazo mi ŝatus danki Renato-n por lia multjara laboro kaj anticipe por lia plua estonta subteno, kaj la redaktoron de la RF-cirkulaĵo, Jorgo, kiu post tiu ĉi n-ro forlasas la redaktoran taskon.

Multaj el vi verŝajne konas min, sed por la ceteraj jen mallonga familia sinprezento: mi loĝas en Israelo, kie mi estas profesoro de astrofiziko en la universitato de Jerusalemo. Kvankam mia edzino kaj mi ne estis “internacia paro”, ni ja konatiĝis en Esperanto-kurso. Ni havas tri infanojn, Tali (14), Maja (11) kaj Raneto (5), kun ĉiuj tri mi parolas Esperanton denaske. Hejme ni parolas ĉefe la hebrean, sed la infanoj fakte estas trilingvaj, ĉar la du filinoj naskiĝis en Usono, kaj tiun ĉi jaron ni denove pasigas en Usono.

Mi kredas ke RF plenumas gravan rolon servante kiel ligilo inter familioj kaj generacioj: ĝi reprezentas la mezan generacion, kiu ofte ankaŭ havas malgrandajn infanojn. Tiu generacio troviĝas inter la junularo kaj la pli aĝa generacio, kiu konsistigas la plejpar-

ton de la E-movado. Mi kredas ke RF devas surpreni eĉ pli grandan rolon ol tiun kiun ĝi plenumis ĝis nun, en pluraj terenoj:

1. Krei pli efikan ligilon inter la E-familioj kaj atingi pli da familioj per la “Cirkulaĵo” (eventuale en nova formo) kaj per pluaj rimedoj (ekzemple la interreto).

2. Plue kontribui al la evoluigo de “familiaj” terminoj (la “Hejma Vortaro”, kiun iniciatis Renato, kaj transprenis Jouko Lindstat kun internacia teamo de nacilingvaj respondeculoj — ĝi estas havebla sur la TTT, kaj baldaŭ aperos nova papera eldono).

3. Agi por plibonigi kaj multinombri la renkontiĝojn por E-familioj kaj infanoj. Nuntempe la plej konataj el tiuj estas REF, PSI, IF kaj la IIK (lige kun la UK). Mi kredas ke unu el la plej gravaj celoj de RF (kaj fakte de la tuta E-movado) estas subteni kaj flegi tiun “malfortan” intergeneracian grupon de ĉirkaŭ 1 000 E-familioj, per la kreo de bonaj kondiĉoj por internaciaj familiaj renkontiĝoj.

4. Dediĉi apartan atenton por la infanoj de E-familioj, por havigi al ili pli da okazoj taŭgaj por sperti Esperanton en internacia etoso. Tiu aĝo povas esti la decida tempo en ilia E-evoluo, ĉu ili perceptos Esperanton kiel enua kunveno de olduloj aŭ mirakla mondo ankaŭ por infanoj. Mi havas du bonajn pruvojn pri tio: miaj du filinoj, kiuj plurfoje spertis la IIKn.

5. Speciale la Internacia Infa-

na Kongreseto estas grava rimedo por doni al niaj esperantistidoj la eblecon sperti internacian infanan etoson, kaj por logi ilin al la E-socio. Ĝi samtempe donas al la gepatroj la eblecon partopreni la Universalan Kongreson, kiu alikaze povus esti malfacila aŭ neebla kun junaj infanoj. Nuntempe la IIK ne plene efektivas tiun potencialon pro ĝia alta kotizo, kompare kun similaj internaciaj renkontiĝoj. Tio estis la impreso kiun mi ricevis de multaj diskutoj kun geamikoj kaj E-familioj en internaciaj familiaj renkontiĝoj.

6. Mi proponas ke RF, kunlabore kun UEA, klopodu adapti la IIKn por pli bone plenumi tiujn celojn, kiuj ja ne estas nur celoj de RF, sed de la tuta Esperanto-movado. Mi jam faris konkretan proponon al UEA restrukturi la IIKn laŭ tiuj linioj.

Fina vorto kaj alvoko: mi ne kapablas plenumi tiun taskon sole. Mi bezonas la kunlaboron, sperton kaj voĉojn de aliaj gepatroj kaj familioj. Tiun subtenon vi povas doni per leteroj aŭ artikoloj al la Cirkulaĵo kaj al aliaj Esperantorevuoj.

Se vi sentas ke tiuj temoj gravas al vi kaj vi pretas dediĉi iom da tempo kaj energio por influi la estontan evoluon, aliĝu al la komisiono pri RF, kiun ni nun reorganizas.

Se vi povas finance helpi al nia agado, via kontribuo al la konto “idoj-p” estos bonvena kaj utila. ■

# Kelkaj fragmentoj de la 84-a UK

de TAN XIUZHU

**L**A 84-a Universala Kongreso de Esperanto okazis de la 31-a de julio ĝis la 7-a de aŭgusto 1999 en Berlino, kun 2 612 partoprenantoj el 65 landoj.

## LA KONGRESURBO KAJ KONGRESA TEMO

Mi ja havas grandan intereson kaj scivolemon pri la gastiganta urbo Berlino. Ĝuste kiel diris d-ro L. C. Zaleski-Zamenhof, nepo de la aŭtoro de Esperanto, en la inaŭguro, ĝi estas “urbo kies ĉiu ŝtono ŝajna grave ŝarĝita de historio, urbo, kiel oni iam ordonis, ke Esperanto malaperu, sed urbo, kiu fariĝas por la semajno venonta ĉefurbo de Esperanto, urbo, kie oni iam estris la holokaŭstron de hebreoj, sed kiu dum kelkaj tagoj simbole transdonos la verdan standardon al la amikoj en Tel-Avivo”.

La unuaj impresoj pri Berlino kiujn mi havis ĉefe el filmoj estis ruino de la milito, poste la Berlina muro, kiu staris kiel simbolo de la kontraŭstaro de la Oriento kaj Okcidento. La terura masakrado de la nazioj al judoj ĝis nun hirtigas miajn harojn, sed la surgenuiĝo de la eksĉefministro de la Federacia Germanio s-ro Willy Brandt antaŭ la monumento al masakritaj judoj en Varsovio forte kortuŝis min kaj vekis mian estimon al li. La malfavora sinteno de GDR al Esperanto siatempe grave influis nian EPĈ, ke ĝi paŭzis preskaŭ tri jarojn de 1954 ĝis 1957, sed en Germanio ni havis amikojn, perantojn kaj legantojn, kia s-ro Karl Maier.

Vere estas signifoplene diskuti pri la kongresa temo “Tutmondiĝo



Ĉe ĝiĉeto de “El Popola Ĉinio”

— ĉu ŝanco por paco” en la urbo kun tia historia fono. Post viglaj debatoj oni ĝenerale konkludis, ke tutmondiĝo prezentas ŝancon al paco, sed ĝi ne estas ŝanco por paco. “Analizinte la aktualan, ĉiam pli rapidan disvolviĝon de la tutmondiĝo, kiu tamen realiĝas laŭ modelo, kiu kuntrenas la elĉerpon de la naturaj rimedoj de nia planedo, tio estas de nia heredaĵo al la postaj generacioj, kaj kiu alprenas en multaj rilatoj la formon de superregado fare de la plej prosperaj landoj de la mondo, kaj sekve elvokas fortiĝon de naciismo kaj apartiĝemo multloke, kio siavice endanĝerigas pacon,” la kongreso “alvokas al Unuiĝintaj Nacioj, al ties instancoj, al ĉiuj internaciaj forumoj, al la neregistaraj organizaĵoj kaj al la uzantoj kaj parolantoj de Esperanto tra la mondo doni gravan atenton al tiuj ĉi aspektoj de tutmondiĝo kaj klopodi direkti la procezon tiel, ke ĉiuj homoj de la terглоbo profitu el ĝi. Tio povas okazi nur ĉe senkondiĉa respekto de ĉiuj homaj rajtoj in-

kluzive de la rajtoj je lingva kaj kultura diverseco”; “alvokas al la ekonomie prosperaj kaj politike fortaj ŝtatoj celi ne asimilon de la cetera mondo sed unuiĝon kun ĝi surbaze de reciproka kompreno, respekto kaj reciprokaj avantaĝoj, ĉar nur tia tutmondiĝo povas garantii por la homaro solidan pacon en vera feliĉo”.

## NIAJ TRI GERMANAJ AMIKOJ

En la inaŭguro de la kongreso s-ro Osmo Buller, ĝenerala direktoro de la CO kaj s-ino Michela Lipari, ĝenerala sekretario de UEA, honore menciis la nomojn de s-ro Karl Maier, kiu kun 98 jaroj estis la plej aĝa inter la kongresanoj, kaj s-ro Bruno Vogelmann pro la 90-a datreveno de lia naskiĝo en la 30-a de julio 1999. La tuta ĉeestantaro salutis ilin per varma aplaŭdado. Mi kaj miaj kolegoj kaj samlandanoj en la kongresejo sentis dublan ĝojon pro tio, ĉar ili estas niaj malnovaj fidelaj amikoj dum multaj jaroj.



S-ro Karl Maier lernis Esperanton jam en 1924. Li venis al Tianjin de Ĉinio en 1932 kaj laboris tie kiel dentisto 22 jarojn. Dum tiu tempo li konatiĝis kaj amikiĝis kun multaj ĉinaj samideanoj. Post kiam li revenis al la Orienta Berlino en 1955, li fariĝis peranto de EPĈ. Pro sia diligenta laboro li havis jam pli ol 300 abonantojn fine de 1961. Posttagmeze de la 3-a de aŭgusto mi kaj mia kolego Wang Jianbing kaj s-ino Yu Jianchao el la Esperanta Sekcio de la Ĉina Radio Internacia iris viziti lin en lia hejmo. Malgraŭ sia granda aĝo kaj nia insista deadmono li iris al la trajnhaltejo por nin atendi. En lia loĝejo ĉie videblas ĉinaj objektoj: ĉinstilaj ŝrankoj, pentraĵoj, brodita murtapiŝo, porcelanaĵoj kaj aliaj memoraĵoj, ĉio ĉi tio montras la amon de la maljunulo al Ĉinio kaj ĉina kulturo.

S-ro Bruno Vogelmann estas bone konata de nia verda komunumo kiel ricevinto de la Premio de Deguĉi en 1992 kaj Premio de Fame-fondaĵo en 1993. Dum la kongreso oni okazigis prelegon pri lia verko "Nova Realismo", en kiu mi menciis kelkajn liajn aferojn rilate al Ĉinio kaj ĉina Esp-movado: lia prelegvojaĝo tra Ĉinio pri medioprotekto en 1984, lia kunlaboro kun Ĉina Esperanto-Eldonejo por eldoni la Internacian Komer-

La aŭtoro (meze) kun s-ro Reinhard Seltzen kaj lia edzino



ca-ekonomikan Vortaron kun aldono de ĉina kaj japana lingvoj en 1990, la Novan Realismon en la ĉina kaj Esperanto samtempe en 1992, lia subvencio al la Ĉina Esperanta Biblioteko, al trejnado de ĉina Esperanta fakulo, al eldono de la Ĉinmedicina Vortaro, k.a. Okaze de lia 90-jariĝo ni preparis por li salutkarton kun subskriboj de niaj samideanoj en la oficejo de ĈEL kaj EPĈ. Dum la kongreso ankaŭ aliaj samideanoj inkluzive de estintaj kaj estantaj gravaj homoj de nia komunumo subskribis sur ĝi sian nomon por esprimi kune kun ni varman gratulon kaj altan respekton al li. Mi kredas, ke tio multe ĝojigos lin.

La tria germana amiko estas s-ro Heinz Schindler, kiun s-ro Osmo Buller menciis en la fermo de la kongreso kiel ricevinton de la ĉijara Premio de Fame-fondaĵo. Dum la pasintaj jaroj li partoprenigis je sia propra kosto pli ol 10 samideanojn ĉefe el malriĉaj landoj kiel Bulgario, Ĉinio, Kazahio al universalaj kongresoj kaj aliaj Esperantaj renkontiĝoj. Li ankaŭ subvenciis kulturajn aferojn de nia movado kiel eldono de la libro



Prof. Humphrey Tonkin (maldekstre) kaj la aŭtoro

"Monumente pri Esperanto" de UEA kaj plurfoje mondonacis al nia Fondaĵo EPĈ-abono. La tri menciitaj samideanoj meritas nian admiron kaj profundan riverencon. Ni sentas nin fieraj kun ili kiel amikoj.

## EPĈ EN LA KONGRESO

La kunsido de EPĈ-legantoj jam fariĝis kutima programero de la kongreso. Ĉi-jare ĝi okazis preskaŭ tuj post la solena inaŭguro, al kiu partoprenis ĉ. cent homoj. Inter ili estis nia malnova peranto s-ro Karl Maier, eksprezidanto de UEA s-ro Lee Chong-Yeong kaj iama vicprezidanto s-ro Ulrich Lins kaj vicprezidanto de KAEM s-ro Takeuti Yosikazu. En la kunsido mi, kiel reprezentanto de EPĈ, prezentis al niaj legantoj la aktualan situacion de EPĈ kaj kelkajn aranĝojn planitajn de la redakcio por festi la 50-jariĝon de la revuo en la venonta jaro, kiel ekzemple starigo de nova rubriko rilate al tiu 50-jariĝo kaj organizado de vizitgrupoj de legantoj kaj perantoj al Ĉinio. Kaj la legantoj same kiel antaŭe montris al ni grandan simpatian per diversaj proponoj pri la enhavo, formo kaj distribuado de la revuo.

Ni ankaŭ havis giĉeton en la kongresejo, kie ni ne nur varbis abonantojn, sed ankaŭ akiris novajn amikojn kaj interŝanĝis diversajn



Ĉe giĉeto de TEJO

informojn. Preterpasante nian giĉeton s-ro Humphrey Tonkin, iama prezidanto de UEA, laŭdis nian laboron pri EPĈ, demandis pri niaj malfaciloj kaj montris deziron iable helpi nin.

### INTERPAROLO KUN D-RO REINHARD SELTEN

Prof. Reinhard Selten, kiu ricevis premion Alfred Nobel pri ekonomiko en 1994, enkondukis IKU, kiel ĝia direktoro en la kongreso. Renkontinte lin kaj lian edzinon en la kongresejo mi havis kun ili tre liberan interparolon. Al mia demando, kiel li opinias pri la Berlina kongreso kaj IKU, li respondis, ke li estas kontenta pri la kongreso kaj la prelegoj de IKU estas interesaj kaj sufiĉe multe vizitaj. Kiam mi diris al li, ke ni ofte

mencias lian nomon por propagandian lingvon en konsidero ke li mem estas elokventa atesto por persvadi la publikon, li ridis kaj diris, ke li deziras ion fari por nia movado, kvankam li estas okupita

pri la fako. Krom Esperanto li parolis ankaŭ iom pri scienca disvolviĝo de Usono kaj Germanio, pri la edukado de Germanio kaj Ĉinio, pri siaj studentoj el Ŝanhajo kaj Taiwan de Ĉinio, kaj sia baldaŭa vizito al Ĉinio. En imago de ni ordinaruloj, li kiel Nobel-premiito povas esti dignoplena kaj eĉ mistera, sed efektive li estas homo tre afabla kaj facile alirebla kaj ankaŭ bona edzo. Dum la kongresaj tagoj li ĉiam estis kune kun sia edzino, persone puŝante ŝian rulseĝon. Mi diris al ili, ke ili ĝuas ne nur la kongresajn programerojn, sed ankaŭ feliĉon de la kunestado. Tiam s-ino Elisabeth Selten vidigis sur sia vizaĝo mildan rideton en signo de kontento kaj konsento. Ŝi diris, ke hejme ili ne povas ĉiam tiel kune, s-ro Selten havas sian propran aferon kaj ŝi po-

vas sendepende fari multon. Vere agrable kaj ne forgeseble por ni paroli kun ili.

### ALIAJ EROJ DE LA KONGRESO

Najbare de la giĉeto de EPĈ estis giĉeto de TEJO kaj tiu de afrika agado. Tie ofte kolektiĝis amasoj da viglaj gejunuloj kaj interesatoj. Ili aldonis al nia kongreso vivecon kaj koloron.

En la kongreso KAEM-anoj el Japanio, Koreio kaj Ĉinio kun Puramo Chong kiel prezidanto akurate kunvenadis kaj serioze kaj devokonscie diskutis kaj decidis gravajn problemojn por la azia movado.

Pro sia diligenta kaj fruktodona laboro kaj ankaŭ pro montrita kapablo niaj japanaj kolegoj vaste promociiĝis en la kongreso: s-ro Yamasaki Seiko elektiĝis kiel honora membro de UEA, s-ro T. Huzimoto kiel nova estrarano zorganta pri landa agado kaj kulturo, s-ino Syozi Keiko kiel membro de la elekta komisiono kaj s-ro Takeuti Yosikazu kiel komitatano C. Gratulon al ili.


Premio "Infanlibro de la Jaro 1998" estis aljuĝita al Kroatia Esperanto-Ligo pro la libro "Mirindaj aventuroj de metilernanto Hlapic" de Ivana Brlic-mazuranic. Ĝin esperantigis Maja Tišljar, denaska Esperanto-parolanto el Kroatio, stu-

dentino pri astronomio kaj fiziko en Universitato Bonn en Germanio. Ŝi kaj ŝia fratino Danka Tišljar kune ludis en la "Dramo por kvin aktoroj, du publikoj, unu infano kaj unu teknikisto", kiu ricevis grandan ŝaton en la kongreso.

La programeroj de la kongreso estis tre abundaj kaj mi ne povis pritrakti ilin ĉiujn, tamen ĉiu kongreso vizitita estas por mi nova sperto gustoplena, senescepte la Berlina.

Kunsido de EPĈ-legantoj





- 1 En la inaŭguro de la 84-a UK
- 2 Wang Jianbing (la dua de dekstre), asista ĝenerala sekretario de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj UEA-estrarano pri afrika agado (la tria de dekstre)
- 3 S-ro Heinz Schindler kaj ĉinaj samideanoj
- 4 Ĉinaj samideanoj gastas ĉe S-ro Karl Maier.



# Vizito al Makao (III)

de ZHANG MEIZHI

## MAKAO HAVAS ĈINAJN JUĜISTOJN

En la transira periodo de Makao la Makaanoj ĉiam priatentas 3 problemojn, nome regionigi leĝon kaj registarajn dungitojn kaj oficialigi la ĉinan lingvon.

Por koni la justicon de Makao, laŭ propono de amiko, mi vizitis Chu Kin, Cen Hofei kaj Song Manlei, kiuj estas la unuaj indiĝenaj juĝistoj kaj prokuroroj. Ili estas pli ol-20-jaraj kaj akiris universitatan titolon de Makao aŭ aliaj urboj de Ĉinio pri juro kaj studis en Portugalio antaŭ jura trejno en Makao.

S-ro Song diris: "Kvankam antaŭe en Makao la kodoj estis de ĉiuj kategorioj, tamen la Makaanoj procesis malfacile pro tio, ke la kodoj devis esti tradukitaj el la portugala lingvo en la ĉinan, ĉar multaj Makaanoj ne scias la portugalan." Laŭ la Fundamenta Leĝo de la Speciala Administra Regiono de Makao (SARM), Makao havos sian leĝofaran rajton kaj jurisdikcion post sia reveno al Ĉinio. Oni konservas tiujn artikolojn de la malnova leĝo nekonfliktajn kun la Fundamenta Leĝo kaj forigas aŭ konservas tiujn artikolojn, kiuj portas koloniisman koloron aŭ ne akomodigas al la aktuala situacio. La leĝo regionigita estas reviziita en leĝon por akomodigi al la aktuala situacio de Makao kaj tradukita en la ĉinan lingvon. Ili diris, ke granda parto de la Makaa leĝo estas finreviziita kaj tradukita.



Song Manlei (maldekstre), Chu Kin (meze) kaj Cen Hofei (dekstre)

Dum la regionigo de la leĝo oni regionigas ankaŭ leĝofaristojn kaj juĝistojn. S-ro Chu diris, ke la Fundamenta Leĝo postulas ke la juĝisto devas havi kvalifikitecon kaj esti konstanta loĝanto de SARM. Nun jam estas 10 juĝistoj kaj 13 prokuroroj, kaj 9 homoj estas trejnataj.

## LA ĈINA LINGVO FURORAS

En Makao mi konatiĝis kun indiĝenaj portugaloj. Ili estas Alberto, Marreiros, Santos kaj Coutinho. Ili estas posteuloj de ĉina kaj portugala geedzoj. La portugalaĵ posteuloj en Makao okupas 2.5% de ĝia tuta loĝantaro. Iutage mi vizitis la portugalan restoracion funkciigatan de Marreiros. Ĝuante pladojn, mi aŭskultis lian familian historion. Li diris ke antaŭuloj de lia patrino ekvivis en Makao antaŭ 200 jaroj. Lia patro estas portugalo. Sed li, naskita en Makao, edziĝis al virino naskita en Portugal-

io. Mikssanga Marreiros povas paroli en la lingvoj portugala kaj franca kaj dialekto de Guangdong.

Li esperas esti juste traktata. Antaŭe iuj portugaloj servis en la Makaa registaro. Ili ne volas tuj akcepti ĉinan ŝtatancon post reveno de Makao al Ĉinio. Tamen ili havas la rajton elekti ŝtatancon. Fakte granda parto de ili volas daŭre vivi en Makao inkl. Marreiros. Post kelkaj tagoj Coutinho diris en malbona komuna ĉina parola lingvo: "Mi vivas de mia infaneco en Makao kaj havas multe da amikoj tie. Mi havas profundan amon al Makao."

Por daŭrigi sian laboron en Makao multe da indiĝenaj portugaloj eklernis la ĉinan lingvon. Kvankam la Fundamenta Leĝo montras ke la ĉina kaj portugala lingvoj estas oficialaj, tamen ili opinias ke la ĉina lingvo estos vaste uzata. Coutinho diris: "Mi devas multe paroli en la ĉina." ■

# Nova aspekto de la antikva ĉefurbo

Teksto de ZHAO XI

Fotoj el fotoekspozicio "Pekino Hieraŭ kaj Hodiaŭ"


Pekino, ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko, malfermis sian novan paĝon en la 1-a de oktobro 1949.

Dank' al la kuna klopodo de ordinaraj laboruloj dum la pasintaj 50 jaroj tiu antikva urbo kun miljara civilizacio havis grandajn ŝanĝiĝojn: la antaŭaj malaltaj

domaĉoj estis anstataŭigitaj per altaj domegoj. Pekino, kiel internacia metropolo rapide evoluinta vekas la atenton de pli kaj pli multaj homoj.

Pekino elspiras kaj antikvecon kaj modernecon. Tie belas imperiestraj ĝardenoj, imponas antikvaj konstruaĵaroj, majestas la Granda Muro, vastas la placo Tian'anmen, etendiĝas Chang'an-strato, kuŝas kvadrataj kortoj en tipa nacia stilo, prosperas verdaj arboj, aromas buntaj floroj

Moderna domego vid-al-vide al antikva konstruaĵo en vespero



Vizitantoj interesiĝas pri kvadrata korto en Pekino. Foto de NIU XIWU


kaj staras 120 aŭtovojoj trefkruciĝoj en diversaj formoj. Ho, pli kaj pli ĉarmas Pekino.

Foto de TIAN BAOXI







Nova plansetlejo  
Foto de QIN DATANG



Aŭtovoja trafikruĝo ĉe Fuxingmen  
Foto de WANG HUIMING





Ĉe strato en Pekino  
Foto de ZHANG SUO'AN



Aŭtovoja trefkruciĝo ĉe Dongbianmen  
Foto de WANG HUIMING



Malnova fizionomio de Dongbianmen

La antikva urbo en nokto

Foto de WANG HUIMING



Malnova fizionomio de Fuxingmen



# Kostumo, loĝdomo kaj ligna bovlo

Teksto kaj fotoj de  
CHENG WEIDONG

**M**I konstatis, ke Diqing-altebenaĵo estas Shangrila longe serĉata de mi, kaj ne nur pro ĝia pitoreska pejzaĝo, mirinda tersurfaco kaj primitiva kulturo, sed ankaŭ pro tio, ke ĝiaj loĝantoj tiel harmonie kunfandiĝis kun la paca kaj idilia vivmedio, mi ne povas ne rakonti pri ĝi.

## “PEJZAĜO” SUR VESTOJ

En Ĉinio tibet-nacianoj loĝas ne nur en la Tibeta Aŭtonoma Regiono, sed ankaŭ en la provincoj Qinghai, Yunnan kaj Sichuan. Ili konservas samajn naciajn kulturon, religion kaj morojn, sed pro diferenco de vivmedioj ili havas evidente malsamajn karakterizaĵojn. Vestoj de tibet-nacianoj en Benzilan de Diqing-subprovinco estas unu el la plej karakterizaj: pompaj kaj multtekostaj, kiajn en la ĉiutaga vivo oni ne portas. Estas feliĉe, ke tie arta festivalo havigis al mi ŝancon spekti belajn tibetstilajn vestojn.

Same kiel tibet-nacianoj de aliaj lokoj, ankaŭ la tieaj ŝatas porti robon. Sur la altebenaĵo sunbrilo estas forta, kaj la vetero — ŝanĝiĝema: jen pluvus, jen

sunas, kaj kiam la suno estas alte pendanta, la temperaturo altas, sed kiam nuboj kovras la sunon, tuj malvarmiĝas. Tia alterno oftas sur la altebenaĵo. Tial robo manifestas sian avantaĝon: ŝirmi la korpon de malvarmego, dum en varmego oni demetas unu manikon kaj volvas ĝin ĉe la talio. Oni uzas ĝin ankaŭ kiel “litkovrilon” dum nokto. Ĉar oni ofte portas unu manikon, iom post iom la alia fariĝas ornamaĵo. La roboj estas kolorriĉaj, kaj la materialo estas silko, felto aŭ lano. Kaj la plej valoraj vestoj estas borderitaj per felto. Krom tio la ornamaĵoj estas multaj: por virinoj kapornamaĵoj, kolieroj, fingroringoj, orelingoj kaj braceletoj el oro, arĝento, perloj, agato, jado, turkiso kaj koralo, dum por viroj tali-glavo montranta forton kaj potencon. La prezon de tiuj ornamaĵoj neniu konas. Ili estis

hereditaj de generacio al generacio, eĉ iuj estas historiaj restaĵoj. Por mi la moroj kaj kulturo en la tibetstila vesto estas tre allogaj.

## LOĜDOMOJ DE NIXI

Nixi, 72 km okcidente de Benzilan, estas alia distrikto de Diqing. Ĝi situas ĝuste en valo de la altebenaĵo. Inter verdaj arboj kaj vidiĝas kaj kaŝiĝas tibetstilaj loĝdomoj. En Zhongdian la loĝdomoj havas du arkitekturajn stilojn: unu estas duetaĝa lignotegmenta domo kun tri ĉambroj, kaj ĉe la fronto estas koridoro kaj la aliaj flankoj — muroj el tero. Dum loĝdomoj en Nixi karakteriziĝas alie — plattegmenta domo, kiu estas du aŭ trietaĝa, iuj eĉ kvin-etaĝaj, kaj sur la balkono oni povas sunumi grenojn. La muroj estas el ŝtonoj aŭ tero, kun kelkaj fenestroj. La unua etaĝo

estas stalo de brutoj, kaj la dua — dormoĉambroj, salono, tenejo, kaj la plej alta — preĝoĉambro. La domo estas forta kaj la koloro — okulplaĉa.

Domoj de Shangqiaotou-vilaĝo, kiu konsistas el 32 familioj, apartenas al tia stilo. Je la unua vido mi jam sciis, ke ĝi estas tibet-nacia vilaĝo. Ĝi famas pro



Tibet-naciaj vestoj ekspoziciataj en muzeo de Diqing





Viro en tibet-nacia vesto

farado de tradiciaj lignaj bovloj. En granda hela ĉambro, Sunnuo Ciren, pli-ol-70-jara maljunulo, diris al mi, ke jam pli ol 50 jaroj pasis de lia eklernado de la metio en lia 12-jara aĝo. La metio en la vilaĝo jam havas pli ol centjaran historion.


Tibet-nacianoj ŝatas lignan bovlon, kiu estas simpla, fortika kaj nerompiĝema. Ĝenerale ĝi estas farita el radikoj de rododendro aŭ acero. Tamen tiuj, kiuj el parazi-

taj plantoj, estas nigre helaj, kun vejnoj klaraj kaj delikataj. Estas pompe, se oni ornamas ĝin per oro aŭ arĝento. Laŭdire, se ĝi ricevas venenon, ĝia koloro tuj alikoloriĝas, tial ĝi estas rigardata kiel trezoro. La maljunulo diris, ke bovlo por viroj diferencas de tiu por virinoj en grandeco kaj alteco. Dum nia interparolado li demonstris al mi lakadon de bovlo per kruda lako. La lakita bovlo aspektas ora kaj estas nedekoloriĝema eĉ en varme-

go, acido kaj alkalo. Krom bovlo, la vilaĝanoj faras ankaŭ skatolon el ligno por teni buteron aŭ manĝaĵojn el sekala faruno. Nun la bovloj vendiĝas ankaŭ en aliaj tibet-naciaj regionoj de Ĉinio kaj aliaj landoj, kiaj Hindio kaj Nepalo. Kaj nemalmultaj turistoj vizitis la lokon precipe por aĉetado de bovlo. Menciante tion, la maljunulo aspektis fiere.

### MALJUNA METIISTO DE FAJENCAĴOJ

La fajenco-farado de Tangman-vilaĝo estas pli antikva ol la bovlafarado de la vilaĝo Shangqiaotou. Tiu metio ekzistis jam pli ol mil jarojn en Tangman. La instrumento por fajencofarado ŝajnas simpla. Sunruo Shilin diris, ke li eklernis la metion en la aĝo de dekelkaj jaroj. En lia hejmo mi rimarkis, ke ĉie troviĝas fajencaĵoj faritaj de li mem. La formoj kaj koloroj estas simplaj, elegantaj kaj modestaj. Li diris, ke ĉiumonate li povas fari pli ol 100. Ĉu argilopreparado ĉu fajenco-bakado, ĉiuj laboroj estas faritaj de li mem. Li bezonas nur 50 minutojn por fari argilan kruĉon. Laŭ mia peto, li demonstris al mi procedon de tepoto. Post malpli ol unu horo nebakita delikata kaj simpla tepoto aperis antaŭ mi. Ĝi kostas nur 25 juanojn. Mi ŝatis tiajn fajencaĵojn kaj volis ilin aĉeti kiel memoraĵon, tamen pro averto de kompaniano, ke longa vojo atendas min, mi elektis nur du el ili kaj pakis ilin en dikajn vestojn. ■





1. Tibet-nacia familio
2. Farado de lignaj bovo
3. Farado de fajencaĵoj
4. Loĝdomoj de tibet-nacianoj
5. Knabino en tibet-nacia vesto

Teksto de PANG NAIYING

Fotoj de DU ZEQUAN

**P**OST esplorado sciencistoj asertis, ke la kanjono de la rivero Yarlung Zangbo en Tibeto, Ĉinio, estas la plej granda en la mondo. Ĝi longas 496.3 ki-

lometrojn. La meznombra profundo de la ĉefa parto de la rivero estas 5 000 metroj kaj la plej granda profundo — 5 382 metroj. Yarlung Zangbo, la plej alta rivero en la mondo, fontas de la degelinta neĝo de la norda deklivo de Himalajo, zigzagas en montaroj kaj torentas suden kun granda bruo laŭ la U-forma kanjono patronata de la

montpintoj Nanjiabawa kaj Jialabailei respektive 7 782 kaj 7 234 metrojn super la marnivelo, kiujn la tibetanoj nomas diaj montoj. Sin kaŝante en nebulo, la montoj malofte lasas la homojn vidi ilian veran aspekton.

En la kanjono la kvar sezonoj dispoziiciĝas vertikale: Sur la supro de la montoj pendas glaciriveroj kaj majestas polusaj pejzaĝoj,



**Tra la kanjono**

sur la montodeklivo laŭvice troviĝas pejzaĝoj de la zonoj malvarma kaj mezvarma; malsupre de la monto aromas floroj kaj kantas birdoj kvazaŭ en la tropika pluvarbaro. La subluma kanjono havas sennombrajn misterojn kaj ankaŭ danĝerojn, de tempo al tempo furiozas tertremo, lavango, terlavango kaj glacirivera kotŝtona fluo. Ĉio tio fermis la kanjonon en mistero por la publiko.

De la 19-a de oktobro ĝis la 10-a de decembro 1998, la ekspedicio el 60 ĉinaj sciencistoj, ĵurnalistoj kaj alpistoj la unua faris piediran

travadon en la kanjono...

### SINCERA VIZITO

Biologoj prenas la kanjonon kiel "Geno-bankon de specoj". Kiam la terглоbo vizaĝas al drasta reduktiĝo de la specoj, en la kanjono prospere reproduktiĝas pli ol 3 700 specoj da vegetaloj, pli ol 2 000 specoj da insektoj kaj pli ol 80 specoj da raraj bestoj.

Geosciencistoj opinias, ke la kanjono estas la plej bona eksperimentejo sub la libera ĉielo, en kiu oni povas solvi la enigmon pri la terглоbo. Antaŭ 50 milionoj da jaroj la hinda bloko koliziis kun la eŭrazia, malaperis la oceano kaj


leviĝis la Qinghai-Tibeta Altebenaĝo... Ĉi tiu sekreto estis registrita sur la faŭlto de la kanjono.

Atmosferaj fizikistoj opinias, ke la kanjono estas koridoro, tra kiu la varma humida aerfluo de la Hinda Oceano iras al la altebenaĝo. Ili volas konfirmi la rolon de la koridoro kaj ĝian influon sur la klimato kaj medio... Unuvorte, oni havas multon por konsulti la kanjonon.

Sed tio estis vojaĝo plena de neimageblaj malfaciloj. Sen vojo, la ekspedicianoj devis pere de ŝnuroj grimpi sur krutajn deklivojn kaj trapasi balanciĝantajn pendopontojn aŭ glitkablojn super torenoj. La tiel nomata glitkablo fakte estas sola ŝtala kablo aŭ liena ŝnurego fiksita sur la apikaj krutaĵoj



# de Yarlung Zangbo




Tropikaj siringoj


La montpinto Jialabailei



Rara vegetaĉo en la  
apoko de dinosaŭro



Kaskado kun ŝtupo  
de 35 m



La neĝmonto Duoxiongla  
en aŭtuno

Kurbiĝo de Yarlung Zangbo



ambaŭflanke de la kanjono, kaj sur la kablo estas liena ringo. Homo sidas en la ringo, ligas sin per sekuriga ŝnuro kaj glitas kun la vizaĝo supren al la ĉielo pere de inercio kaj oblikveco de la kablo. Kiam la kablo sin direktas supren, oni devas streĉi la kvar membrojn por sin treni antaŭen. Foje en tiu okazo malligiĝis la sekuriga ŝnuro ĉe iu ekspediciano, sed neniu povis doni helpon. En tiu kriza momento la deziro de saviĝo superis la ekstreman teruron, kaj li streĉiĝis el la haŭto kaj fine venis al la transa bordo...

Preskaŭ en ĉiu momento la ekspedicianoj estis minacataj de morto. Transgrimpante la neĝmonton Duoxionĝla pli ol 4 000 metrojn super la marnivelo, pro manko de oksigeno ili sentis, kvazaŭ ili havus plumbon en la gamboj. Sed kiam ili estis irantaj sur la ŝtonetoj sur la ŝoviĝema deklivo, ili ne povis fari solidajn paŝojn, kaj tiam ili kvazaŭ dancis sur pintaj ŝtonoj. Televizia raportisto falis kaj la skapolo rompiĝis. Li eltenis teruran doloron kaj iris kune kun la ekspedicio. Post 7-taga irado la ekspedicio eliris el la senhoma regiono...

Vicestro de la ekspedicio malsaniĝis. Foje en primitiva arbaro li iris de la 6-a matene ĝis la 8-a vespere, kaj iom post iom li malproksimiĝis de la ekspedicio kaj svenis en herbaro. Kiam oni trovis lin, lia vizaĝo kaj kolo sangadis pro suĉa-

do de multaj hirudoj.

Kiel geologo, s-ro Ji Jianqing alkutimiĝis al la vivo sub la libera ĉielo. Sed esplorado en la kanjono ankoraŭ frape impresis lin. Li skribis en sia taglibro: "Nin torturas soifo, malsato, ekstrema laciĝo, psika turmento de senesperigo kaj trista sento antaŭ la nemastrebla vivo... Pluvas. Ni havas kotonon en la piedoj kaj ofte falas. 52-jara, li falis 11 fojojn en duonhoron..."

Ili havis malfacilojn ne nur en irado, sed ankaŭ en ripozo. En la kanjono preskaŭ ne estas ebena tero. Iliaj tendoj estis duone pendantaj sur krutaj deklivoj kaj duone subtenataj per fostoj, do tra la tuta nokto ili devis firme premi ilin per la piedoj, por ke la tendoj ne falu en la riveron. Kiam ili devis tranokti sur malebena loko, ili devis unue plenigi la kavetojn per herboj kaj arbustaj branĉoj, aŭ simple sin kurbigi en fendojn sur la roko...

En 37 tagoj ili piediris pli ol 600 kilometrojn, spertante diversajn danĝerojn. Ili kaj admiris la povon de la universo kaj bedaŭris pro la malgrandeco de la homoj, dirante, ke kun la naturo homoj devas harmonie kunesti. La trairado estis sincera vizito al la naturo.

## AKVOFALO, TAKSUSO KAJ ZORAPTERO

Akvofaloj ne estas fremdaj al la lokaj ĉasistoj. Kiam ĉi tiuj sekvis la bruadon de falakvoj kaj kondukis

la ekspedicianojn al la akvofaloj, ĉiuj ekzaltiĝis. En 1986 fotisto Che Fu faris aerfotadon kaj fotis la akvofalojn. Kaj de tiam la ĉinaj sciencistoj ĉiam deziris konfirmi ilian ekziston. Dum ĉi-foja esplorado ili trovis kvar grupojn da altaj falakvoj ĉe la riverparto 20 kilometrojn longa nordokcidente de Yarlung Zangbo. Inter ili la tri plej altaj akvofaloj altas 30-35 metrojn kaj larĝas 60-120 metrojn. La akvo fluge falegas malsupren kaj estigas nebulon reflektantan ĉielarkon. Specialisto klarigis, ke tiu parto de la rivero havas kaj torentan fluon kaj multajn kurbojn, kaj la niveldiferenco de ĉiu kilometro estas 22 metroj. Tio formas la unuan miraklon de Ĉinio, kaj tia vidaĵo estas malmulta en la mondo. Krome, argumentado pruvis, ke la akvofonto de la rivero estas pli riĉa ol la aliaj grandaj riveroj de Ĉinio.

Biologoj estis ravitaj de la sukceso en la esplorado en tropika pluvbaro. Botanikisto Wang Chongjie absorbiĝis en esplorado de vegetaloj kaj estis pikitaj de vespoj, ke lia kapo estis plena de ŝvelaĵoj. Sed li ĝojis, ke li trovis raran arbospecon taksuso (*Taxus chinesis*). La ekstrakto de tia arbo estas multe pli kara ol oro kaj aparte efika por kuraci kanceron. Nun malmultaj taksusoj kreskas en la mondo, kaj en Ĉinio oni trovis tiajn arbojn nur en la provincoj Yunnan kaj Sichuan. Sed ĉi-foje oni

En terŝoviĝa regiono





# Scenoj en urbo

Fotoj de LOU LINWEI kaj NIU XIWU

Materialo de la Ŝtata Statistika Buroo de Ĉinio publikigita antaŭ nelonge montras, ke en la lastaj 20 jaroj post la ekpraktikado de reformado kaj pordomalfermo, la popolo multe sin riĉigis kaj relative pli rapide leviĝis ilia vivnivelo. Tion oni kredis laŭ ŝanĝiĝo de salutvorto. Antaŭe oni intersalutis per demando "ĉu vi manĝis", kaj nun oni ŝatas demandi: "Kie vi turismis?" Manĝado estas la plej grava afero en la vivo de homoj. Dum la periodo kun malbona ekonomia situacio, la demando "ĉu vi manĝis" esprimis reciprokajn prizorgojn de la homoj. Nun manĝado jam ne estas la unua problemo en la vivo de la popolo, kaj la popolo ja havas pli kaj pli multajn ŝatokupojn rilate la spiritan vivon. Espereble ĉi tiuj fotoj kun diversaj scenoj povas pruvi mian diron.



Luj ĉinoj realigis sian revon aĉeti aŭton.

malkovris, ke taksusoj troveblas en areo de pli ol 1 000 kvadrataj kilometroj en la kanjono.

Zoologo Yao Jian esploris insektojn. Liaj manoj estis pikvunditaj de urtiko kaj la doloro estis malfacile eltenebla. Sed li estis rekompencita per eltrovo de pereonta speco de insekto zoraptero (*Zoraptera*). Tiu primitiva "viva fosilio" vivis en tropika pluarbaro kaj sur iuj insuloj ĉe la ekvatoro, preskaŭ ne povis flugi kaj kaŝe vivis preskaŭ dum la tuta vivo. Ĝia ekzisto en la kanjono elokvente pruvis la doktrinon de "kontinenta drivo". Drivo de kontinentaj blokoj portis tiajn insektojn en la sudorientan Tibeton, kiuj formiĝis en sendependan specon. Tio atestis la rolon de la koridoro de humida aerfluo, ke ĝi pretigis la medion de tropika pluarbaro konvena por vivado de la tropikaj "enmigrintoj". Kia miraklo ĝi estas! Sciencisto renkontis insekton 50 milionojn da jaroj post orografia movado

de la terglobo.

Ĉiuj ekspedicianoj multe rikoltis en la esplorado. Ili diris, ke la kanjono estas "trezorujo", ke ĝi estas la lasta heredaĵo riĉa kaj fragila, per kiu la naturo dotis la homaron. Ajna detruo al la primitiva ekologia sistemo estas neriparebla. La homaro devas domaĝi ĝin.

## DANKINDAJ "GARDO-DIOJ"


Sen savo de alpistoj, juna ekspediciano Ji certe pereus en la torento. La kvar alpistoj de monda nivelo estas tibet-naciaj junuloj. Ili jam plurfoje surgrimis la lokojn altajn je pli ol 8 000 metroj sur Qomolangma. Dum la ĉi-foja esplorado ili elhakis vojon, instalas ponton, enbatis kojnojn kaj instalas sekurigajn ŝnurojn sur krutaĵoj. Bone sciante, ke ilia ĉeesto povos forigi danĝerojn, la ekspedicianoj ameme nomis ilin gardo-dioj.

Por ke la sciencistoj konservu la forton, tiuj fervoraj junuloj prenis sur sin multajn laborojn, ekzemple

serĉi akvofonton, elekti tendumejon, kolekti brullignon, prepari manĝaĵojn, enterigi rubon... Kiam la ekspedicio bezonis portistojn, ili volonte faris interpreton.

La voĝvidistoj kaj portistoj estis menba-oj kaj loba-oj, kiuj vivas de ĉasado kaj terkulturado ankoraŭ primitiva. Antaŭe ili loĝis en grotoj kaj nun en konusaj domegoj el ligno. Iliaj vilaĝoj situas alte sur montoj kun pitoreska ĉirkaŭaĵo. Sur la montoj kreskas bananoj, ananasoj, citronoj kaj aliaj tropikaj fruktoj. En arbaro viglas diversaj bestoj kaj birdoj. Menba-oj kaj loba-oj estas mastroj de la kanjono kaj filoj de la naturo, kiun ili ĉiam respektas.

Pro lingva baro la portistoj malofte parolis, sed ĉiam plenkore atentigis la ekspedicianojn pri sekureco. Se iu vundiĝis aŭ malsaniĝis, ili serĉis drogherbojn por kuraci ilin; se iu falis en danĝeron, ili faris helpon kaj samtempe preĝis al monto-dioj kaj river-dioj... ■





Poŝtelefono faciligas komunikadon.



Strata ofertisto de asekura kompanio.



Novgeedzoj



Ekspozicio de modeloj de loĝdomoj aĉeteblaj je kredito.



En ribeŝtato.



Pentrado de angulturo de la Imperiestra Palaco.

# Ŝanĝiĝoj en 50 jaroj (III)

de JI PING

**P**ROKSIME de mia oficejo troviĝis aŭtovoja trefkruciĝo konstruita en 1978. Tiam pekinanoj ja ĝojis pri ĝia finkonstruiĝo, ĉar ĝi estis la unua trefkruciĝo dividinta koridorojn por aŭtoj kaj bicikloj. Sed antaŭ nelonge ĝi malkonstruiĝis, ĉar ĝi ne plu kontentigas la bezonon de la hodiaŭa trafiko. Kvankam en la lastaj jaroj la magistrato multe investis por vojkonstruado kaj larĝigo de malnovaj ŝoseoj kaj la nombro de ĉirkaŭurbaj vojoj jam atingis kvar, tamen la trafiko ne evidente boniĝis pro tio, ke la nombro de aŭtoj rapide kreskis. En 1978 estis nur 80 000 aŭtoj en Pekino, sed nun — 1 400 000. Konstrui aŭtovojjajn trefkruciĝojn, fermajn

ĉirkaŭurbajn vojojn kaj subterajn fervojojn estas sur la plano de urbegoj, kiaj Pekino, Ŝanhajo kaj Kantono. Post nelonge en Pekino la totala longeco de ĝiaj ekspresaj aŭtovojoj atingos 620 km.

En la 50 jaroj la fervoja trafiko en Ĉinio havis grandan ŝanĝiĝon. Antaŭ 50 jaroj la totala longeco de fervojoj estis 21 800 km, kaj la larĝeco estis malsama. Tiam ne troviĝis elektrizita fervojo, nur vapormaŝinoj estis uzataj. La ŝoseoj malbonkvalitaj longis nur malpli ol 80 000 km kaj la plejparto de ili estis en ĉemaraj regionoj. Ankaŭ interurba aera trafiko estis multe subevoluinta. Oni telekomunikadis ĝenerale per kurtonda radio kaj lineo. Telegrafa kaj telefona servo estis plenumata per homlaboro. Duono de la provincoj kaj regionoj de la lando ne

havis aŭtomatan telefonion, kaj triono de la gubernioj ne havis telegrafion kaj interurban telefonion.

Hodiaŭ en Ĉinio fervojoj, ŝoseoj, akvovojoj, aerlinioj kaj kabloj formis retojn telekomunikajn kaj trafikajn. Iu pekinano, laborinta en Tibeto 50 jarojn, diris, ke antaŭe li bezonis minimume duonmonaton por la vojaĝo al Pekino, sed nun nur du tagojn (necesas ŝanĝi aviadilon survoje kaj ne ĉiutage estas aviado). Lastajare oni levis la rapidecon de trajno kaj ĝenerale efektiviĝis, ke trajno ekveturas en vespero kaj atingas la finstacion en la sekvanta mateno. Kvankam ne troviĝas rapidega trajno en Ĉinio nek aerlinio en iuj ĝiaj urboj, tamen kompare kun la pasintaj jaroj, ĉinaj trafiko kaj telekomunikado jam multe progresis.

	1949	1998
Totala longeco de fervojoj (km)	21 800	65 000
Totala longeco de aŭtovojoj (km)	80 000	1 260 000
Interurba aera var-cirkula kvanto (cent milionoj da tunoj ĉiukilometre)	2	33.5
Posedantoj de telefono (miliono)		110
Posedantoj de poŝtelefono (miliono)		30
Optika kablo (km)		173 000

## KURANTAJ AFEROJ

● Antaŭ nelonge Ĉinio asigis monsumon por konstrui 5 kluzojn sur la Granda Kanalo pli ol 1 700 km longa, inter Pekino kaj Hangzhou tra Nankino. Ĝi, 2 000-jara, estas unu el la 5 famaj akvovojoj de Ĉinio.

● Estas ekkonstruita la dudirekta submara optika kablo (20 000 km) — Azia-pacifika Optika Kablo N-ro 2 — la plej lon-

ga en Azio. Ĝi etendiĝas ĝis Japanio kaj Koreio kaj, tra landinterno de Ĉinio, Hongkong kaj Taiwan, ĝis Malajzio kaj Singapuro.

● Ĉinio esploras submaran naturgasan hidraton, kiu estas blanka solidaĵo, simila al glacio kaj facile bruligebla. Ĝi, altenergia kaj vaste distribuita, havas grandan rezervon kaj malprofundan kuŝejon. Eble ĝi ludos gravan rolon en la

venonta jarcento.

● Orienta globofiŝo, rigardata kiel “reĝo de la fiŝoj”, estas sukcese arte fekundigita en la meza baseno de Yangzi-rivero. Nigravejna orienta globofiŝo estas migranta fiŝo. Ĝia karno estas bongusta kaj nutroriĉa, tamen ĝiaj sango kaj hepato havas fortan venenon 1 250-oble kiom kalia cianido, povantan anstataŭi atropinon kaj heroinon

# Privataj entreprenoj en Ĉinio

de JI PING

**E**N 1949, kiam fondiĝis la nova Ĉinio, troviĝis multaj privataj entreprenoj, tamen en 1956 la ŝtato transformis tiujn privatajn entreprenojn, kaj ŝtataj entreprenoj anstataŭis la privatajn. De tiam al la ĉina ekonomio mankis privata branĉo. Depost 1978 Ĉinio praktikas la politikon de por-domalfermo, en la kamparo laŭkontrakta familia laborsistemo praktikiĝas, kaj en urboj la ŝtato permesas disvolvi individuajn metiejojn kaj etkomercon. La mastroj de tiuj individuaj metiejoj ja estas aŭroro de la bela estonteco. Kiel atendite, la mastroj de metiejoj kaj etkomercistoj pligrandigis sian aferon. Ili dungis helpantojn aŭ lokajn aŭ alilokajn, kaj iom post iom metiejoj ŝanĝiĝis en privatajn entreprenojn. Sed tiam la ŝtato ankoraŭ ne klare difinis la privatajn entreprenon kaj ekonomion kaj ne ellaboris politikon stimuli ilian disvolviĝon. Ekzemple en 1981 la ŝtato permesis, ke individua mastro povas dungi nur 1-2 helpantojn kaj akcepti maksimume 5 metilernantojn. En aprilo 1988, kiam rapide disvolviĝis privataj entreprenoj, la ŝtato permesis ekziston de privata ekonomio kaj ĝian disvolviĝon laŭ



Aŭtovoja trefkruciĝo konstruata

leĝo, rigardis ĝin kiel suplementon de la socialisma publika posed-sistemo kaj komencis defendi la rajtojn kaj interesojn de privataj entreprenoj. Nun jam estas 1 229 200 privataj entreprenoj kun 16 889 800 laborantoj.

La disvolviĝo vigligis la merkaton, donis pli da laboraj ŝancoj kaj kontentigis la bezonon de homoj en diversaj flankoj: kostumo, elektroaparato, arkitekturo kaj eĉ altteknologio... En Pekino, en 1998 laborantoj de privataj entreprenoj estas nur kvindekono de tiuj de la tuta urbo, tamen la produktovalore kreita de ili konsistigas kvinonon de la tuta urbo. Same kiel en Ŝan-

hajo, la Ŝanhaja Nisaila Sensatora Kompanio venkis rivalojn, kiaj la Germana Korporacio Siemens kaj la Nederlanda Kompanio Philips, kaj 96% de ĝiaj produktaĵoj vendiĝas en pli ol 20 regionoj kaj landoj. La produktaĵo — infraruĝradia sensatoro konsistigas trionon de la samspecaj produktaĵoj en la internacia merkato kaj okupis la unuan lokon de la mondo.

Kompreneble en Ĉinio la publika posedsistemo ankoraŭ ludas ĉefan rolon, tamen la ŝtato plue praktikos la politikon subteni la disvolviĝon de privataj entreprenoj, kaj ĉi tiuj certe perfektigis kaj disvolviĝos. ■

kiel sedativo kontraŭ doloro kaŭzita de kancero kaj kontraŭ infana konvulsio, paralizo kaj toksigo.

● Ĉinaj sciencistoj sukcese ellaboris malkomponigaĵon de plastaĵoj, kiu efikas ĉe sunbrilo. La tekniko, vaste aplikata en Ĉinio, povas solvi la "blankan polucion".

● Ĉinaj sciencistoj trovis lag-

on, kies temperaturo estas 12-13°C de la akvosurfaco ĝis la loko 11 metrojn profunda kaj 4°C en la loko 14 metrojn profunda.

● La 9-12-an de oktobro 1999, la Ĉina Internacia Komerco-akcela Komitato kaj la Ĉina Internacia Komerca Ĉambro okazigos la Eksterakomercan Intertraktan Kunven-

on de la Ĉina (Hebei) Internacia Komerca Komitato de 1999 en Shijiazhuang, ĉefurbo de Hebei-provinco. En la kunveno okazos ekspozicio pri agrikulturo, scienco kaj medioprotektado, kaj intertraktado pri teknika reformado de entreprenoj, transigo de proprieto de produktaĵoj kaj programo de investo.

# Arta klerigo pli grava

de PANG BIAN

**L**A unua violona komponaĵo de Ĉinio estis farita de geologo Li Siguang. Tiam neniu rimarkis la influon de muziko sur sukceso de sciencisto.

Lastatempe kuracistoj pruvis per medicina instrumento, ke la cerbeto de muzikistoj estas pli granda ol tiu de aliaj homoj je 5%, fakte la cerbeto regas la subtilan agon de la homoj.

Nun en Ĉinio arta klerigo fariĝas esplorotemo de edukistoj.

## PENTRADO KAJ IMAGIPOVO

Yuanyuan estis silentema. Li ne ŝatis babili kun aliaj knaboj. Poste lia parolkapablo progresis malrapide kaj li ofte gape mienis. Liaj gepatroj plendis pri lia denaska stulteco.

Sed la belarta instruisto opinias, ke al Yuanyuan ne mankas intelekto, sed imagipovo. La instruisto pentris rondon kaj demandis lin: "Kio ĝi estas?"

"Rondo."

"Kio estas rondo?"

Yuanyuan silentis. La instruisto fingre montris la ĉielon. Yuanyuan tuj respondis: "La suno, luno kaj ankaŭ terглоbo."

"Bone!"

La instruisto tre ĝojis pro lia respondo kaj plu sugestis al li: "Sur nia rondo terглоbo ekzistas diversaj rondaj objektoj ekz. por ludo, manĝo..."

La knabo tuj respondis: "Pilkoj por futbalo kaj tablotenis; akvomelono, pomo, juglando..."

"Kiel vi scias tiujn?"

"Mi vidis ilin. Ankaŭ la kapo kaj okuloj estas rondaj!"

La knabo tre ekscitiĝis. Post pripensado li daŭrigis.

"Instruisto, rondo signifas nion, ĉar 1-1=0, 0 estas rondo. Mi scias ankaŭ ke rondo signifas rekuniĝon. Kiam mi naskiĝis, miaj geavoj el kamparo venis al ni por rekuniĝo familia. Do mi nomiĝas Yuanyuan (signifanta rekuniĝon)." La instruisto surpriziĝis pro lia vigla penso.

Sub la instigo de la instruisto, Yuanyuan diris sian penson al siaj kamaradoj. Ĉi tiuj aplaudis lin. Kaj tiam li fariĝis esprimema. Foje li kaj lia patrino iris sur strato. Vidinte aŭtovojan trefkruciĝon, la knabo subite diris: "Estontece mi starigos sur la ĉielo ponton, kiu povos interligi la lunon kun steloj. Kaj oni povos veturi al diversaj steloj per rapidveturilo." Reveninte hejmen, li pentris tion laŭ sia imago.

La ĉina edukado pri infana belarto tradicie atentis kopion, sed nun imagipovon. Iu belarta instruisto diris: "La infana pensmaniera kulturo en belarto estas pli grava ol belarta instruo." Li opiniis, ke pentrado povas progresigi figurpensadon de infanoj. La trijara infano lernas pentradon pli rapide ol parolon, kaj per bildo li esprimas sin pli bone ol per parolo.

Nun la ĉina infana belarta edukado disvastigas metodon por ima-

gipova kulturo. La kulturado kovras 3 periodojn. En la unua periodo instruisto kulturas la observokapablon de malgrandaj infanoj por riĉigi figurojn en ilia memoro; en la dua periodo analogion kaj sinsekvan pensadon de iom pli grandaj infanoj; en la tria periodo la instruisto elvokas liberan imagon de pli aĝaj infanoj al la estonteco per pentrado.

La instrumentado estas resumita de Du Mei, kiu okupiĝis pri belarta instruado dum multaj jaroj. Ŝi provis sian metodon per siaj gefiloj. Poste la filino akiris magistrecon pri metiarto kaj la filo fariĝis pormagistriĝa studento de la Munkena Scienca kaj Teknika Universitato en Germanio. Kaj ŝi dediĉis sian energion al esplorado de intelekta disvolvo per belarto kaj akiris grandan sukceson. Iu knabo eklernis ĉe ŝi belarton en la 4-jara aĝo. 9-jara, li kreis la fabelon "Saĝa Ĉevalo", kiu rakontas, ke ĉevalo en arbaro iris en urbon kaj fariĝis homo, kaj akirinte saĝon de homo, ĝi revenis en arbaron. La gepatroj de la knabo diris: "Nia filo dum la tuta vivo profitos el la pentrado kaj pensvigleco instruitaj de sino Du. Kompreneble li eble ne fariĝos pentristo, tamen li certe sukcesos en sia laboro."

## MUZIKO KAJ KAPABLO-KULTURADO

Tradicie la ĉina muzika leciono instruas ĉefe muziknotojn kaj kantojn. Nun kelkaj lernejoj ekinstruis ludon de muzikaj instrumen-



En trejnado

toj pro tio, ke infanoj estas moviĝemaj.

Lele estas petola knabo. En la unua klaso, dum instruisto skribis sur la nigra tabulo, li aŭ ludis per papera aviadilo kaj mastiko aŭ petolis kun aliaj lernantoj. Li ne povis absorbiĝi en la leciono kaj lernis malbone, kaj liaj gepatroj maltrankviliĝis post malsukceso de severa kritiko kaj pacienca admono.

Sed en muzika leciono la knabo interesiĝis pri akordiono. La instruisto diris: "Ritmo estas animo de muziko, kaj oni devas atente aŭskulti por percepti." Sekve li ekatentis pri sonoj de akordiono. Kelkajn jarojn post sia diligenta trejniĝo, li povis ludi per akordiono eĉ malfacilan melodion. La instruisto diris: "Lele havas talenton de muziko, li povas sukcesi ankaŭ en lernado de aliaj studobjektoj." Aŭdinte tion, li diligente studis kiel ludi akordionon. Kiam li diplomiĝis de elementa lernejo, li akiris ateston de akordionludo

de la 8-a klaso kaj eniris bonan mezlernejon.

Liu Yan en sia infaneco eklernis muzikan instrumenton kaj bone ludis ĝin. En element-kaj mezlernejoj estis elstara lernanto kaj, 14-jara, eniris faman universitaton.

Tiaj ekzemploj estas sennombraj. En ordinara lernejo de Pekino grupo da lernantoj kun intelekto ordinara ekludis en 1988 akordionon, kaj oni komparis ilian lernadon de ĉefaj studobjektoj kun tiu de alia grupo, en kiu ĉiuj lernantoj estis elstaraj. Post unu jaro la lernantoj de la akordiona grupo superis tiun de la elstarantoj kaj ilia supereco daŭris ĝis ilia diplomiĝo de la elementa lernejo.

La provo montras ke altigi intelekton ofte dependas de multe da faktoroj, inter kiuj la muzika klerigo estas grava.

Knabino Li Shan estis suferanto de denaska kormalsano. Kvankam ŝi ne povis partopreni lecionon de korpokulturo, tamen persiste ludis

akordionon. Ŝi sentis sin serena, ludante akordionon. Iom post iom ŝia kormalsano mirakle malaperis.

Xu Wanshui estas muzikinstruisto en mezlernejo. Li opinias ke la moderna edukado substrekas ne nur disvolvi karakteron, sed ankaŭ kultur moralon. Li ĉiam atentigas kultur estetikon. Li instruas "Ĥoraĵo Flava Rivero", patosan kanton verkitan en 1939 kiu tekstas: "Vento muĝas, ĉevalo henas, Flava Rivero bruas..." Li diris al la lernantoj, ke la kanto prezentas la necedeman karakteron de la ĉina nacio, kiam fremda nacio invadis. La Flava Rivero simbolas la nacian spiriton. La lernantoj diris: "La kanto inspiras nin diligente lerni por potencigi nian landon."

En Ĉinio oni ekkonsciis la gravecon de kapablo-kulturado. Altigi la kapablon de lernantoj kaj kultur talentulojn kun idealo, lerteco kaj kreiveco estas celo de kapablo-kulturado kaj estetika eduko de Ĉinio. ■

# Saĝo en kvieto

*Ĉu vi povas sendi al mi pli plenajn informojn pri monaĥinejo, aŭ pri la budhanaj monaĥinoj en Ĉinio ĝeneralaspekte?*

MARCO ALBE' (Italio)

de XIANG HONG

**P**AŝINTE en la straton Zhenxian, mi tuj sentis drastan diferencon inter la kvieteco antaŭ mi kaj la vigleco de trafiko post mi, sur la strato. Starante antaŭ la ruĝe lakita ligna pordo de la monaĥinejo Tongjiao, mi hezitis enpaŝi: Interne de la altaj muroj estas loko de monaĥinoj, mondo tute fremda por mi, kaj mi ne estis certa, kiajn homojn mi renkontos.

Mi ne povas forgesi la rigardon de la viro, kiun mi demandis pri la vojo. "Pro kio vi iras al tia loko? Ĉu vi tediĝis de la laika mondo?" la viro scivoleme demandis min. Jes, publika opinio estas, ke oni monaĥ(in)iĝas aŭ pro granda malfeliĉo aŭ pro malesperigo por la vivo. Mi timis, ke mia vizito tuŝos ilian vundon.

Poste mi komprenis, ke mia timo estas senbaza.

En densa ombro min atendis abatino Sizhi kun afabla rideto. Mi miris pro ŝia juneco, sed ŝiaj gestoj estis sufiĉe konformaj al ŝia abatineco. Min ne evitis monaĥinoj en griza mezlonga robo aŭ bruna froko. Renkontante min, ili ridete salutis min kun manoj kunmetitaj antaŭ la brusto kaj foriris per graciaj paŝoj. Sur ilia vizaĝo mi ne vidis postsignon de malfeliĉo, sed trankvilecon,



En la monaĥinejo Tongjiao

senhastecon kaj sanon.

Ŝajne abatino Sizhi travidis mian penson. Post reciproka saluto ŝi komencis konigi al mi la vivon de la monaĥinoj.

Ŝi diris, ke laŭ la vidpunkto de monaĥ(in)oj, en ĉies koro estas deziro, kiu povas senlime ekspansiiĝi kaj estas neniam kontentigebla, tial la homa vivo estas plena de diversaj ĉagrenoj kaj la vojaĝo de la homa vivo subkonscie perdas la vojon. La monaĥ(in)oj kredas, ke nur la Budho ĝisfunde konsciis la veron de la homa vivo, tial la monaĥ(in)oj memvole akceptis la veron (aŭ darmon) por transpasi ĉiajn fiajn dezirojn, sin kulturi en bonfaranton kaj helpi pli da homoj strebi al bonfaro kaj fine akiri eternan vivon. Tial oni devas tiel opini, ke ili monaĥ(in)iĝis post sufiĉe longa konsidero, sed ne kiel la

laikoj supozis, ke ili monaĥ(in)iĝis pro senliro.

Antaŭ la miskompreno de la laikoj, abatino Sizhi diris: "Fakte budhismo enhavas la plej grandan saĝon, sed ne superstiĉon. La monaĥoj kaj monaĥinoj ne facilanime decidis vivi sen familia feliĉo. Forlasinte sian indi-

viduecon, ili akiris la saĝon pri la vivuloj kaj la universo. Ĉu tio ne estas vivmaniero pli ideala kaj pli nobla? Kiam ni travivis provon dum kelke da jaroj kaj estis incitaj per pritondo de kapharoj, nia koro estis plena de senlima ĝojo! Memkulturado de mateno ĝis vespero forpelis niajn ĉagrenojn kaj fidezirojn, kaj ni sentis solidecon kaj kvietecon en la koro. Rigardu, kiu el ni havas mienon de ĉagreno?"

La kondiĉoj difinitaj de la budhisma disciplino por monaĥ(in)iĝo klare vidigis, ke homoj sorĉitaj de malfeliĉo kaj implikaĵoj povas akiri konsolon kaj helpon en templo, sed al ili ne estas permesate monaĥ(in)iĝi. Monaĥiniĝo en Tongjiao estas kondiĉita en kvar flankoj: unue, oni devas havi sufiĉan piecon; due, oni devas aĝi malpli ol 25 jarojn; trie, oni devas



havi klarecon de almenaŭ supera mezlernejo; kaj kvare, oni devas esti libera de ŝuldo, krimo, oficista rango kaj edzeco. Budhismo opinias, ke pli junaj homoj estas relative pli puraj kontraŭ la polucio de la laika mondo, sekve pli facile komprenas la darmon de la Budho. Abatino Sizhi monaĥiniĝis en la aĝo de 21 jaroj, sed ŝi ankoraŭ bedaŭris, ke tiam ŝi jam estis multe pli aĝa.

Eksonis sonorilo en la monaĥinejo. Estis la 11-a, horo de tagmanĝo por la monaĥinoj. Post tagmezo ili ne manĝas. Kondukate de la abatino, mi trapasis vojon pavimitan per ŝtonaj platoj kaj borderitan de granat- kaj persimonarboj kaj venis al la manĝejo purega. La ekstera ĉambro estas manĝejo kaj la interna estas kuirejo. Ĉe la enirejo staras ŝrankoforma klimatizilo, kiu sentigas abruptecon pro la fono kun antikva gusto. En la monaĥinejo estas 40 monaĥinoj. La malfortaj kaj maljunaj prenas manĝon en sia ĉelo. Monaĥinoj eniris unu post alia kaj venis al la kutima sidloko. La ĉambro ŝajnis iom malvasta. Post preĝo ili ekmanĝis senbrue. La manĝo konsistis el rizaĵo, farunaĵo kaj kaĉo, kaj estis pladoj de fazeolo, toŭfuo, tomato, kukumo kaj kapsiko. Mi scias, ke monaĥ(in)oj estas multe pli puremaj ol ordinaraj homoj, tial mi estis emociita, kiam la abatino disponigis al mi sian bovlon kun surskribo "Inicite de Wutai", kiun ŝi akiris kiel memoraĵon ĉe sia iniciteco en la templo en Wutai-montaro, kiu estas unu el la kvar budhismaj sanktejoj en Ĉinio.

Post tagmanĝo estas siesto. De la dua kaj duono ĝis la kvina ili parkeras sutrojn kaj litanias en la preĝhalo. La monaĥinoj ellitiĝas duonon post la tria matene kaj tuj iras en la preĝhalon por parkeri sutrojn. Ili rigardas sutroparkeron kaj litanion pli gravaj ol manĝo. La matena kaj vespera litanio en la preĝhalo neniam ĉesis en la historio de la monaĥinejo. En Ĉinio estas pli ol 200 mil monaĥoj kaj

monaĥinoj de budhismo en la hanciaciaj regionoj, tibeta budhismo (alinome lamaismo) kaj hinajano. La vivo de la monaĥoj kaj tiu de la monaĥinoj ŝajne estas malmulte diferencaj. Ili vivas sub la rigora disciplino: ne preni manĝon post tagmezo, sidi pli longe ol kuŝi kaj diligente lerni la darmon. Tongjiao estas la unika monaĥinejo en Pekino kaj famiĝis pro la rigoreco de la disciplino. Tiu tradicio estas heredita kaj bone observata de abatino Sizhi. Ĉu ne estas tro malkomforte ellitiĝi tiel frue kiel en duono post la tria? Pri tio la abatino opiniis, ke ju pli malfrue, des pli malkviete, kaj dum sutroparkero kaj meditado en kvieto estas plezuro, sed ne turmento. Ŝi kredas, ke saĝo venas el plej kvieta momento.

Granda kvieteco regis en la korto de la monaĥinejo. En agrabla ombro de granda arbo majstrino Nengben estis leganta ĵurnalon. Ŝi aĝas jam 80 jarojn, sed la aŭdado kaj vidaĵo kaj ankaŭ memoro estas tre bonaj. En la juneo ŝi venis de la nordoriento de Ĉinio al privata budhisma lernejo por knabinoj en Pekino kaj pasigis jam 64 jarojn en la monaĥinejo. "Kiam mi venis, ĉi tiu domo estis en konstruado," ŝi diris montrante laboriston sur la tegmento. "Li estis sendita de la Pekina Budhisma Asocio por ripari la likan tegmenton."

Kelkaj kolomboj trankvile

paŝadis proksime de ni. La majstrino diris al mi, ke la kolomboj ne apartenas al la monaĥinejo, sed ili ŝatas preni la monaĥinejon kiel sian hejmon. Mi admiris la multecon de arboj en la korto, kaj ŝi diris, ke antaŭe estis pli multaj arboj, ke oni tuj povis flari agrablan aromon, enpaŝante en la korton. En aŭtuno, kiam maturiĝas persimonoj, la monaĥinoj kolektas ilin kaj donacas ilin al malsanuloj en proksima hospitalo. La monaĥinejo ne estas izolita de la movoplena kvartalo, diferencaj estas nur la vivmanieroj en kaj ekster la muroj.

Mi demandis la majstrinon, ĉu ŝi envas la viglan vivon ekster la monaĥinejo, pasiginte tie pli ol 60 jarojn.

"Ne! Ĉi tie estas pli bone," ŝi diris ekrigardante min. "Fakte vi estas malpli feliĉaj ol ni." ■



Abatino Sizhi

# Kiel ĉinaj junuloj impresis ilin

*En superaj lernejoj de Ĉinio lernas studentoj el diversaj landoj. Ili persone spertis la vivon de la orienta antikva lando kaj perceptis la agojn de modernaj junuloj de Ĉinio. Wang Jianbing konatiĝis kun tri fremdlandaj studentoj en la fama Ĉina Popola Universitato en Pekino. En la jena facila raportaĵo vi eble trovos kaj la samecon kaj la diferencon de junuloj de malsamaj nacioj kun malsamaj kulturoj.*

Yu Tao

de WANG JIANBING

**E**N la okuloj de Choi Man-won, Mori Yuko kaj Magnus Bjornsson, ĉinaj junuloj estas tre aparte karakterizaj. Mori Yuko de Japanio kaj Magnus Bjornsson de Islando estas studentoj, kaj Choi Man-won de Koreio estas por-doktoriĝa studento pri internacia komunisma movado, kaj krome li estas esperantisto kaj ofte partoprenas en aktivadoj de pekinaj esperantistoj.

## SAMAĜULOJ

Fraŭlino Mori Yuko estas duaklasa studentino de ĵurnalisma fako. En du jaroj en Ĉinio ŝi trovis, ke ĉinaj junuloj samaĝaj al ŝi estas pli maturaj, pli ordemaj kaj pli konsciencaj en plenumo de aferoj.

Sed ĉinaj junulinoj ne kapablas fari ion, kion fraŭlino Mori Yuko kaj ŝiaj samlandanoj rigardas tre simpla. Foje ŝi gastis en hejmo de ĉina kunlernantino. La kamaradino volis gladi vestojn, sed ŝi ne sciis, kiel uzi la gladilon. Tio mirigis ŝin.

La kialo estis tre simpla: intensiĝis la ritmo de la vivo kaj oni preferas porti vestojn, kiujn oni ne bezonas gladi. Ĝuste pro tio gladi-

lo fariĝis malofte uzata de ĉinaj junuloj.

## GRANDA HUMILECO DE LA ĈINAJ JUNULOJ

Magnus Bjornsson estas junulo de Islando, studento de la kvara klaso de la fakultato de internacia politiko.

Kiam li estis 14-jara, li vizitis ekspozicion "Semajno de Ĉinio" kaj ekhavis deziron viziti la malproksiman landon en la Oriento. En 1990 li unuaforte turismis al Ĉinio kaj estis ravita de la vidaĵoj en Ĉinio. En 1995 li refoje vizitis Ĉinion por sperti ĝian drastan ŝanĝiĝon kaj antikvan civilizacion.

Lia unua impresoj pri ĉinaj junuloj estas tio, ke la ĉinaj junuloj estas humilaj en ĉiuj aferoj. Ili emas peti gastojn unue trinki aŭ manĝi. Kiam ili estas laŭdataj, ili ŝatas diri: "Mi faris nenion. Mi estas nenio. Tio estas komplimento." Ŝajne ankaŭ Magnus Bjornsson alutimiĝis al tio, kaj kiam oni laŭdis, ke li parolas flue en la ĉina lingvo, li diris, ke li apenaŭ scias la ĉinan lingvon. La esprimo de humileco kaj ĝentileco de la ĉinoj estas tute diferen-

caj de tiuj de la okcidentanoj. La okcidentanoj esprimas relative rekte, sed la ĉinoj diras eŭfemisme. Kiam ili diris "ne",

oni malfacile povas certiĝi, ĉu la "ne" fakte signifas "jes". Kaj novvenintaj fremdlandanoj malfacile povas sin akordigi al tio.



F-ino Mori Yuko

## PRAKTIKA CELO

"Ĉinaj junuloj havas evidentan karakterizaĵon, nome, ili havas difinitan celon, celon solidan kaj praktikan. Tio ja estas feliĉo de la ĉinaj junuloj," diris fraŭlino Mori Yuko.

"En Japanio, kion vizaĝas la junuloj, kiuj multe penis lernante en famaj universitatoj? En ekonomia depresio, eĉ potencaj kompanioj devas redukti dungitojn, do estas pli malfacile dungiĝi. Estas malsame al la ĉinaj junuloj; ili havas sian celon, kaj tion mi pli forte sentis en universitato. Diligente studi en famaj universitatoj, poste trovi

bonan profesion kaj havi bonan salajron. Ili diligente lernas alilandajn lingvojn por poste studi eksterlande kaj havi pli bonan perspektivon. La celo estas efektivebla. Sed en Japanio, la patra generacio penadis la tutan vivon kaj neniam kuraĝis iom sin malstreĉi. La patra generacio vivis lace, kaj la junuloj ne volas sekvi ilian vojon, sed ne scias, kion ili devas fari. La japanaj junuloj ja estas en tia stato.”

## TROA STREĈITECO EN LERNADO

“En alia flanko eŭropaj junuloj estas pli feliĉaj, ke ili povas facile eniri en superajn lernejojn. Ili ne bezonas lerni tiel streĉite kiel la ĉinaj studentoj. La ĉinaj estas tro lacaj en lernado, senĉese sin preparante por ekzamenoj en la elementa lernejo, mezlernejo kaj universitato.” Laŭ eŭropana vidpunkto, Magnus Bjornsson rimarkis tion. Vere la ĉinaj lernantoj estas kompatindaj vizaĝe al la ekzameno por pli supera lernejo. Multaj el la junuloj, kiuj spertis la bataladon por eniri en universitaton, ankoraŭ havas timon. En Ĉinio, eniro en universitaton estas strikte kunligita kun la estonteco. La klereco, fako kaj renomo de la lernejo, ĉiuj influas la enoficiĝon. Sen universitata diplomo oni malfacile trovas bonan profesion. Monotona estas la vivo de la ĉinaj junuloj, la orbito de multaj el ili konsistas nur el la studado, diplomiĝo el universitato kaj ricevo de laboro.

Aliflanke, la ĉinaj junuloj havas tro multe da komuneco kaj tro malmulte da personeco. Sama kriterio kaj sama modelo kreis preskaŭ tute samajn homojn. Rilate tion, fraŭlino Mori Yuko kaj s-ro Choi Man-won aldonis, ke tia fenomeno troviĝas ankaŭ en Japanio kaj Koreio.

Ekzemple en Japanio eduka administracio postulas disvolvi personecon, sed ne scias, kiel disvolvi personecon. Oni ellernis malmulte de la Okcidento kaj perdis sian propran superecon, kaj pro tio aperis ia kaoso. S-ro Choi opiniis, ke tion kaŭzis la diferencoj de la orienta kaj okcidenta kulturo, ke konfuceanismo havas influon sur la orientaziaj landoj, ke la popoloj de tiuj landoj pli atentigas grupan konscion kaj ĉiam metas la kolektivajn konceptojn sur la unuan lokon.

## MANKO DE INICIATEMO

Kiam instruistoj faras demandojn, ĉinaj studentoj malofte respondas memvole, kaj ofte la instruisto vokas ilin al respondo. Pro tio la ĉinaj junuloj impresas Magnus Bjornsson tiel, ke ili ne havas iniciatemon kaj estas introvertitaj. Kiam opinio estas postulata, la ĉinaj junuloj malofte diras la unuajn.

“Fakte ankaŭ japanaj junuloj ne estas parolemaj. Japanoj havas la kutimon, ke ili ne ŝatas paroli pri tio, kion ili faris, do kompreneble ne parolas antaŭ faro.” fraŭlino Mori Yuko diris.

Rilate tion Choi sentis, ke eble koreaj junuloj estas pli bonaj ol la japanaj kaj ĉinaj, ili estas relative ekstravertitaj kaj ŝatas rekte esprimi siajn opiniojn.

## PLI MULTE DA KOMUNECOJ

Ankaŭ la ĉinaj gejunuloj ŝatas furonon. Ili multe scias pri Holivudo kaj popmuzikon de Eŭropo

kaj Ameriko. Kosmetikaĵoj kaj fasonoj de famaj markoj estas facile troveblaj. Gejunuloj portantaj vestojn kun famaj markoj mienas memfide kaj fiere. Por akiri pli bonan disvolviĝon,

ili lernas manipuladojn de komputero en postlaboraj horoj, sin preparas por ekzameno de MBA. En ripoztagoj ili sin distras per disko-danco, bowlingo, ekskurso aŭ vizito al ret-


kafejo. Sen konsidero de iliaj haŭtkoloroj kaj lingvoj, ili ja estas malfacile distingeblaj de fremdlandaj gejunuloj. Post certa tempo de kunestado kun ĉinaj junuloj, la tri fremdlandaj studentoj sentis, ke inter ili kaj la ĉinaj gejunuloj troviĝas kaj komuneco kaj personeco, sed ĉiuj povas amike kunesti. Eble ĉar la nuna ĉina juna generacio kreskas kune kun la praktikado de reformado kaj pordmalfermo de Ĉinio.

“Ĉinaj knabinoj estas mildaj kaj belaj, kaj mi tre ŝatas ilin. Ili ne similas al la eŭropaj knabinoj, kiuj estas tre viglaj en pensado kaj faras al la viroj grandan premon.” Magnus Bjornsson laŭdis la ĉinajn knabinojn. Sed Mori Yuko kaj Choi Man-won trovis, ke ĉinaj knabinoj estas “tre akraj”, dum ilia mildeco estas inter tiu de la eŭropaj kaj amerikaj knabinoj kaj tiu de japanaj kaj koreaj knabinoj.

Ĉinaj knabegoj bone impresis Mori Yuko. Ŝi diris, ke ŝi volas havi ĉinan knabegon kiel kompanon, se ŝi povos trovi la deziratan. Sed ŝia patrino eble malfacile aprobas tion, ĉar ŝi ne povos trankviliĝi, se la filino havos fremdlandan kiel kompanon. ■



S-ro Choi Man-won



S-ro Magnus Bjornsson

# Geedziĝaj moroj de ĉinaj nacimalplimulto

de JI PING

**L**A geedziĝaj moroj de ĉinaj nacimalplimulto estas grava parto de ilia kulturo.

La evoluo de ĉinaj nacimalplimulto ne estis egalrapida pro diversaj kaŭzoj. Meze de la 20-a jarcento, kiam la ĉefa parto de Ĉinio eniris en modernan civilizitan socion, iuj malproksimaj nacimalplimulto estis ankoraŭ en feŭda aŭ sklava socio aŭ eĉ matriarka socio, same statas ankaŭ iliaj geedziĝaj moroj. Iuj estas observataj nun, aliaj ŝanĝiĝis kaj la ceteraj ne ekzistas plu. Tiuj moroj estas interesaj, sed kompleksaj. Do ni prezentos iujn al niaj legantoj.

## MANOPETO

Vivantaj en lokoj ekonomie subevoluintaj, la nacimalplimulto estas bravaj en manopeto, ne kiel hanoj katenitaj de feŭdismo. La manieroj de manopeto estas malsamaj, tamen kun komuna trajto, t. e. laŭvole verŝi la koron al la amatino.

“Viziti amatinon” estas populara inter vaoj, aĉangoj, lahuoj, de’angoj kaj aliaj nacimalplimulto.

En nokto junuloj vizitas knabinojn arope aŭ sole. Sub bambua domo de knabino, ili ludas blovinstrumenton *luŝeng*, kantas amanton kaj donacas braceleton, arekon k.a. al la knabino.

Estas gloro por la knabinoj, ke junuloj vizitas ilin por peti la manon. Se al knabino plaĉas iu el la junuloj, ŝi do petas lin iri supren. Post multfojaj kontaktoj, se ili volas

gefianĉiĝi, la junulo solene donacas paketon da teo al la knabino kaj ŝi pendigas ĝin sur sia litokapo. De tio ŝiaj gepatroj scias, ke la filino havas amaton.

“Reciproko de kantoj” estas uzata de mulaŭaj gejunuloj en festotagoj kaj ferioj por peti manon. Ĝenerale junuloj de iu vilaĝo invitas knabinojn de alia vilaĝo por la aktivado. Unue ili kantas kolektive. Se iuj plaĉas unu al la alia, ili do foriras. Tio daŭre estas ĉefa maniero por multaj nacimalplimulto en manopeto.

La tajaj gejunuloj havas tian moron. Se junulo amas iun knabinojn, li pentras belan virfenikson meze de papero, skribas ampoemon kaj donas ĝin al ŝi. Se al ŝi plaĉas la junulo, ŝi aldonas sur la papero feniksinon kun floro en la buŝo kaj redonas ĝin al la junulo. Jen tiamaniere ili esprimas sian amon.

## DECIDI GEEDZECON

Multaj nacimalplimulto petas sortodiveniston aŭguri la geedzecon kaj nur post tio ili gefianĉiĝas. Tio kompreneble estas superstiĉa, tamen montras la homan sopiron kaj benon pri la feliĉa geedzeco. Iuj nacimalplimulto estas rigoraj pri sangrilatoj, kiam ili decidas la geedzecon. Ekz. koreoj kaj tibetanoj malpermesas la geedzecon de parencoj.

Ĝenerale oni fianĉiĝas post rigora elekto, tamen ĉe kelkaj nacimalplimulto la manopeto kaj fianĉiĝo estas samtempaj. Neniu rajtas laŭvole retiri la gefianĉiĝon. Oni ĉiam riproĉas kaj punas tiujn, kiuj laŭvole nuligas la gefianĉiĝon.

Fianĉiĝo havas diversajn ceremoniojn. Nu-a svatanto portas kvar botelojn da vino al la hejmo de knabino. Li regalas la samvilaĝanojn per unu botelo. Montrinte sian intencon, la svatanto prezentas la aliajn 3 botelojn. Se la gepatroj de la knabino konsentas, li do petas parencojn de la knabino kune trinki kaj nur tiam deklaras la gefianĉiĝon.

La ŝeoj svatas tiamaniere: junulo petas pliaĝulon porti duonkilogramon da faruno kaj saman kvanton da bruna sukero al la hejmo de la knabino por fari svaton. La gepatroj de la knabino nek respondas rekte nek akceptas la donacon. Se ili diras: “Venu denove.” Tio signifas, ke la gefianĉiĝo eblas. Se ili diras: “Ne plu venu.” Do la espero forvaporigiĝos.

## GAJA NUPTO

Geedziĝo estas grava por ĉiuj. Ĝi simbolas homan prosperon. Estas diversaj nuptoj. Ĝenerale, nupto estas gaja kaj solena. Bonvenigi novedzinon estas preludo de la nupto. Laŭ heĝe-a maniero nombro de la bonvenigantoj devas esti nepara, kaj kun la novedzino, la nombro fariĝas para. La ceremonio okazas en matena krespusko, ĉar ili opinias, ke la elkrespuskiĝo simbolas prosperon kaj feliĉon de la postgeedziĝa vivo.

La nupto de hujoj estas solena. Ĝi okazas ĉiam en la tago, kiam islamanoj kolektiĝas en moskeo. Antaŭvespere de la nupto la novedzino banas sin por montri sian purecon. Imamo prezidas la nupton. Li faras al la novgeedzoj de

mandon kaj esperas jesan respon-  
don, kaj li litanias pri novgeedz-  
iĝo. La novgeedzoj staras sur la  
genuoj kaj pie aŭskultas. Poste ili  
dankas Alahon, frotante sian viza-  
ĝon per la manoj.

La nupto de kirgizoj estas so-  
lena kaj varma, kio iagrade rilat-  
as kun ilia nomadismo kaj  
malofta renkontiĝo. Tiam iliaj  
amikoj kaj parencoj ĉiuj partoprenas en la nupto. Iam la nombro atingas mil. Post la ceremonio okazas ĉeval-konkurso, lukto kaj ŝnurtirado. Vespere gejunuloj kantas kaj dancas kun la novgeedzoj.

Iuj nacimalplimultoj havas specialan moron, kia edziniĝo en plorado. Laŭdire, la plorado montras dankon de la novedzino al siaj gepatroj. Eble en la malnova socio tio montris malkontenton al la kontraŭvola edzinigo.

La edziniĝo en plorado estas nemankigebla por tuĝja-aj novedzi-



En geedziĝa ceremonio de taĝikoj

noj en la nupto. Kiu ploras plej laŭte, tiu estas rigardata kiel plej saĝa kaj kapabla novedzino. Ili ploras pri la gepatroj, pri la fratinoj, pri enpalankeniĝo kaj aliaj.

De la moroj ni konas la socion,

ekonomion kaj kulturon de la nacimalplimultoj historie kaj nuntempe. En iuj regionoj nupto servas kiel parto de turismo, por ke la turistoj konu la historion kaj sociajn trajtojn de la nacio. ■

Kontribuaĵoj petataj por la konkurso “50 jaroj por EPĈ”

## 50 jaroj por Esperanto Paco Ĉinio

En majo de la jaro 2000, la redakcio de El Popola Ĉinio festos sian 50-jaran jubileon. En duonjarcento la revuo EPĈ, la E-movado en Ĉinio kaj la tuta mondo spertis grandajn ŝanĝiĝojn. Vi, spertanto de la 50 jaroj, certe havas ion por verki, por diri al la aliaj. Pro tio ni lanĉos konkurson “50 jaroj por EPĈ” kaj sincere petas vian kontribuaĵon.

Vi povas verki kun tre ampleksa temo, rilate al EPĈ — Esperanto, Paco kaj Ĉinio. Ekz. viaj esperantista sperto, opinio pri E-movado kaj paco, amikaj kontaktoj kun ali-landanoj, impresoj pri rilato kun Ĉinio kaj EPĈ ...

Viaj kontribuaĵoj povas esti en ajnaj stilo

kaj formo. Estas tre bonvenaj koncernaj fotoj kaj portreto de la aŭtoro por ilustrati la artikolon.

La kontribuaĵoj venu al nia redakcio antaŭ la 30-a de aprilo 2000.

Ni aljuĝos premiojn al la kontribuintoj. La premiitoj ricevos ĉinajn metiartaĵojn, E-librojn kaj unu-jaran abonon de EPĈ. Ĉiu kontribuinto ricevos donaceton.

Ni publikigos elstarajn kontribuaĵojn en la rubriko “50 jaroj — EPĈ”. La rezulto de la konkurso legeblas en la julia numero de EPĈ 2000. Dum la 85-a UK en Tel Aviv de Israelo ni anoncos la rezulton kaj disdonos la premiojn.

La Red.

## MONUMENTO "FONTO DE YANGZI"

La 5-an de junio, "Tago de Monda Medio", estis starigita monumento ĉe la rivero Tuotuo (nomo de la plej supra parto de Yangzi-rivero) en la loko je 4 555 m super la marnivelo. La monumento altas 2.5 m kaj pezas 14 tunojn. Sur ĝia fronto legiĝas grandaj ĉinaj ideogramoj kun la signifo "Fonto de Yangzi" kaj sur ĝia dorso estas teksto kun la enhavo vekti la publikan atenton pri la ekologia medio de la baseno de Yangzi-rivero, alvoki la ĉinan popolon prizorgi la fonton de la rivero kaj fari kontribuojn al konstruado kaj protekto de la ekologio de Yangzi-rivero.

Yangzi, 6 300 km longa, estas la plej granda rivero en Ĉinio. Ĝi originas en Tanggula-montaro en Qinghai-provinco. La akvokvanto de Yangzi konsistigas 36% de la ĉina akva fonto, dum triono de la ĉinoj nun vivas en ĝia baseno.


Estas maltrankvilige, ke la ekologia medio en la baseno de Yangzi-rivero, inkl. de tiu de la rivera fonto, rapide malboniĝas, multe eroziigigas grundo, sole en la supra baseno de Yangzi-rivero kaj ĝia fonto 14.3% de la totala areo estas atakataj de la erozio, dezertiĝas la tero, regresas stepoj, malboniĝas vivkondiĉoj de la kreskaĵoj. La grunda erozio kaŭzis seriozan sedimentiĝon de ŝlimo kaj sablo sur la riverlito de la malsupra parto de la rivero. La eksterordinara inundo en 1998 havis striktan rilaton kun malboniĝo de la ekologia medio en la supra baseno kaj fontoloko de la rivero.

Por plibonigo kaj protekto de la ekologia medio de la fontoloko de la rivero, Qinghai-provinco ludos gravan rolon. Ĝuste pro tio la provinco ellaboris specialan protekton de la ekologia medio, difinis celon, t.e. en ĉ. 50 jaroj verdigi ĉiujn lokojn verdigeblajn de la provinco, fundamente haltigi la grundan erozion, restaŭri la stepan flaŭron kaj starigi kompletan reton por kontroli ŝanĝiĝon de la ekologia medio.

## PROTEKTI LA BELAJN KOLOROJN DE LA TERAKOTA PUPO DE QIN-DINASTIO

En la ruino de la terakota legio de Qin-dinastio, Xi'an, elteriĝis argila soldato surgenue arkopafanta. Estas distingiĝe, ke sur la brusto kaj ŝultroj de la figuro vidiĝas multe da freŝe ruĝaj strioj. Prof. Yuan Zhongyi, estro de la Muzeo de la Terakota Legio de Qin-dinastio, kiu respondecis pri prifosado de la kavo n-ro 2, diris, ke tio estas argila soldato kun plej multe da farboj, vidita de li dum la 25 jaroj de post malkovriĝo de la terakota legio. Nun oni faras ĉion eblan por pli bone konservi la farbojn.

Prof. Yuan diris, ke origine la argilaj figuroj estis tute farbitaj, tamen en la pasintaj pli ol 2 000 jaroj, pro diversaj kaŭzoj homaj kaj naturaj nur parto de ili konservis siajn kolorojn ĉe la elteriĝo. Post elteriĝo,



Argila soldato surgenue arkopafanta

pro la sekeco de la aero, la figuroj iom post iom senkoloriĝis, tial la argilaj soldatoj kaj ĉevaloj vidataj nun plejparte estas nigraj. Por solvi la problemon pri dekolorigo de la argilaj soldatoj kaj ĉevaloj de Qin-dinastio, sciencistoj komencis studon jam en la mezo de la 80-aj jaroj. Ili provis protekti la belajn kolorojn per frostigo kaj aldono de proviloj, sed la rezulto ne estas kontentiga. En 1997 oni trovis pliformigan ŝmiraĵon kun forta hidrofileco, kaj dank' al alprenado de tiu materialo oni povis konservi la buntecon de la argilaĵoj. Nun tiu teknologio estas sukcese malkovrita kaj oni planas utiligi ĝin sur pli granda kampo.

## BUDHA RELIKVO EKSPONATA EN SUDORIENTA AZIO

Peco de sariro, t.e. budha dento, estis transportita de Ĉinio en Hongkong kaj iujn landojn de Sudorienta Azio por eksponiĝo. Samtempe la sariro vekis ĝeneralan intereson pro sia eksterordinara historio.

Post sia nirvano Ŝakjamunio (565-485 a.K.) postlasis milojn da sariroj, el kiuj 4 estis la dentaj, sed

nun oni povas vidi nur 2 el ili, unu el kiuj, ore tegita, estas konservata en Srilankao, tial oni ne povas vidi ĝian veran aspekton, kaj la alia estas konservata en la Sarira Pagodo de Lingguang-templo, okcidenta antaŭurbo de Pekino. En la pagodo estas ora miniatura pagodo, antaŭ kiu estas orumita incensujo kaj lotusforma lanterno. La nomita dento ja estas entenata en la miniatura pagodo, farita el pura oro en 1770. La ora pagodo pezas 153 kg. kaj estas inkrustita per 861 perloj kaj gemoj.

En la lastaj jaroj la budha dento estis eksponata en iuj landoj de Sudorienta Azio, kion oni rigardis grava afero. Dum eksponado koncernaj departementoj zorgeme gardis la trezoron, tamen okazis eksterordinara akcidento. Fine de 1996 oni eksplodigis bombon en la ekspona halo, kaj 5 mortis kaj dekelkaj vundiĝis, sed la ora pagodo restis sendifekta.

### MIRAKLAJ GLACIAJ PISTUJOJ



La tiel nomataj glaciaj pistujoj formiĝis tiel: En la antikveco la glacirivero degelis kaj la akvo portante ŝtonojn falis laŭ la fendoj de la glacirivero kaj forte frapis la gigantajn rokojn, ilin turnis kaj frotis.

Forme ili tre similis al antikvaj pistujoj.

Antaŭ nelonge en Jiexi-gubernio, Guangdong-provinco, oni trovis pli ol 350 glaciajn pistujojn grandajn kaj malgrandajn, ovalajn, rondajn kaj petalformajn kun malgranda buŝo kaj barela ventro. Iuj glaciaj pistujoj estas plenaj de gruzoj kaj aliaj glataj. Estas ankaŭ glaciaj pistujoj, en kiuj kreskas floroj kaj herboj.

Glaciaj pistujoj estas ne raraj en la lokoj, kie en la antikveco okazis la grandskala movado de glacirivero, tio tamen estas tre interesa pro la 50-jara diskutado pri tio, ĉu en la orientaj regionoj de Ĉinio 500-1 500 metrojn super la marnivelo ekzistis kvaternara glacirivero. Ĉar la trovo de glaciaj pistujoj en la subtropika zono, malalta latitudo, metis deziratan punkton por la longa diskutado pri tio, ĉu estis kvaternara glacirivero en malalta regiono de orienta Ĉinio, kaj plie ĝi havas gravan scienca valoron kaj akademian signifon por esplori la antikvan klimaton, evoluon de la antikva medio kaj homan originon, tial ĝi estas grava afero ne nur por Ĉinio, sed ankaŭ por la tuta mondo koncerne esploron pri la kvaternara periodo kaj la ŝanĝiĝo de la terglobo.

Diversaj glaciaj pistujoj



# Atesto de bronza historio

de XIANG HONG


**T**IO estas bela momento — sur la scenejo mal-lumiĝas, en la granda halo aŭdiĝas la melodio “Jasmena Floro” ludata per gamosonorilaro. Oni ĝuas la muzikon kaj admiras la antikvan epokon de bronzo — grandegaj kaj delikataj bronzaĵoj kun artaj ornamaj desegnaĵoj, kiuj povas produkti tiel komplikajn melodiojn... Kiel la antikvaj ĉinoj antaŭ 2 000 jaroj kreis sian prosperan epokon?

Por serĉi la fonton de la prospera epoko, ni vizitis ruinon de antikva kupra minejo, kiu situas en Verdigronto de Daye, 70 km oriente de Wuhan, urbo ĉe la meza parto de Yangzi-rivero.

La bronza historio de Ĉinio komenciĝis de Xia-dinastio antaŭ 4 000 jaroj, eĉ pli frue. Multe da dokumentoj kaj elterigitaj bronzaĵoj montras la evoluadon de bronzaĵoj en la antikva Ĉinio. Multaj ĉinaj muzeoj ekspozicias bronzaĵojn en di-

versaj belaj formoj, kiuj estis delikate faritaj por diversaj uzoj. Tio montras, ke tiam ĉinoj havis avangardan teknikon pri fandado kaj muldado de bronzo. Ekz. la gamosonorilaro, per kiu oni ludas “Jasmena Floro”, estas nur parto el la pli ol 7 000 entombigitaĵoj de iu tombejo de la periodo de Militantaj Regnoj (475-221 a.K.). En 1978 oni prifosis tiun tombejon en Suixian-gubernio de Hubei-provinco. La gamosonorilaro konsistas el 65 pecoj kaj pezas 2 500 kilo-

gramojn. La plej granda sonorilo pezas 180 kg. Ili metiĝis en tri vicoj laŭ grandeco sur apogilo el ligno kaj bronzo. Bronza glavo de Goujian, fama reĝo de Yue-regno, kuŝis sub la tero pli ol 2 400 jarojn. Sed ĝi ankoraŭ brilas kaj akras — ĝi povas trapiki dekelkajn pecojn da kunmetitaj paperoj. Per



2 000-jara gamosonorilaro

tiuj elstaraj restaĵoj la arkeologoj kaj historiistoj resumis la 2000-jaran historion de fandado kaj mulda





La ruino de antikva kupra minejo en Verdigro-monto

do de bronzo en Ĉinio. Tio pruvas, ke Ĉinio estas unu el la plej antikvaj civilizitaj landoj en la flanko de laboriloj.

Ĝis la komenco de la 70-aj jaroj la bronza historio de la antikva Ĉinio ne estis kompleta, ĉar ne estas klara, de kie venis la bronzo kaj kiel oni ekspluatis la kupran minon. Estis trovitaj nur kelkaj ruinoj de antikvaj kupraj minejoj, kaj historiaj libroj notas malmulte pri tio. Iuj alilandaj fakuloj eĉ diris, ke la ĉina bronza kulturo fontis el aliaj landoj. Ĉinoj ne povis akcepti tiun konkludon, sed mankis al ili konvinkaj pruvoj.

Kaj neniu rimarkis la ruinon de granda antikva kupra minejo en Verdigro-monto de Daye, kiu dormis subtere pli ol 2 000 jarojn.

Norde de Verdigro-monto estas Daye-lago, kiu ligiĝas kun Yangzi-rivero. La monto abundas je kupro, kaj post pluvo vidiĝas verdigro sur la ŝtonoj, tial ĝi ricevis la nomon. Daye-gubernio fondiĝis en la jaro 956. Daye signifas grandskalan fandadon, kaj tiu nomo estis donita de la imperiestro kaj figure prezentis la lokan trajton. En 1973, kiam la Daye-a Kompanio de Neferaj Metaloj fosis la surfacon de la monto, ĝi trovis 3-metre dikan tavolon da antikva skorio kun totala pezo de ĉ. 500 000 tunoj. Post pri-fosado en 11 jaroj, montriĝis ruino de antikva kupra minejo kun areo de 2 kvadrataj kilometroj. En 7 ekspluatejoj kaj 3 fandejoj estis centoj da ŝaktoj kaj pli ol cent tuneloj. Elteriĝis altfornoj, iloj el bronzo, fero, ligno, bambuo, ŝtono kaj osto kaj ĉiutage uzataj ceramikaj objektoj. Post esplorado oni konstatis, ke la ruino estis de la lasta periodo de Shang-dinastio (16-11-a jc. a.K.), kaj la minejo estis ekspluatata ĝis Han-dinastio en la 2-a jc. Laŭ la fakuloj, antikvaj ĉinoj produktis pli ol 100 000 tunojn da bronzo en

Verdigro-monto.

La fakuloj taksis, ke sub la ruino estas ankoraŭ multe da ercoriĉaj kupraj minoj. Sed ĝi havas pli grandajn historian kaj kulturen valorojn, tiel oni decidis ne ekspluati la minejon. En 1982 la Ŝtata Konsilantaro de Ĉinio enlistigis la ruinon en Verdigro-monto en ŝtatnivelajn protektatajn historiajn restaĵojn. En 1984 la registaro konstruis muzeon pri la ruino kaj ekspoziciejon pri bronza fandado.

La arkeologoj kaj historiistoj ĝojis pri la eltrovo, kiu estas unu el la plej gravaj por Ĉinio kaj tre rara por la mondo. Ĝi donas respondon pri la fonto de la ĉina bronza kulturo kaj valoran materialon por studo de bronza fandado de Ĉinio kaj la mondo. Ĝi estas atesto de bronza historio, kiu ne per vortoj, sed per la antikvaj ŝaktoj kaj iloj konigas, ke antaŭ 2 000-3 000 jaroj la ĉina socio evoluis de la ŝtona epoko al la epokoj de bronzo kaj fero. Tiam ĉinoj jam havis la kapablon ekspluati en tuneloj 60 m sub la tersurfaco, solvis la problemojn pri ventolo, dreno, lumigo, suprentirado kaj protekto de ŝakto. La antikvaj ĉinoj estis lertaj en konstruado de altfornoj, elekto kaj preparo de materialoj, regado de temperaturo ktp. Ĉio ĉi montras, ke en Verdigro-monto oni posedis avangardan teknologion. Tio ankaŭ kompletigis la bronzan historion de Ĉinio.

Nun oni petas enlistigi la ruinon de la kupra minejo en Verdigro-monto en "Mondan Kulturen Heredaĵon". La ruino estas bone protektata: En la nefosita parto oni sternis akvimunan tukon kovritan per tero, sur kiu oni plantis herbojn. Inter tiuj herboj troviĝas "kupraj herboj", kiaj en la antikveco venigis la ekspluatantojn kaj kune kun Daye-lago spertis ŝanĝiĝojn de la Verdigro-monto en miloj da jaroj. ■

# Li teksigas silkraŭpojn

de WEI YIXIONG kaj

YE HUA'AN

**S**-RO Zhang Tiannong estas supera instruisto de silkraŭpobreda fako en profesia mezlernejo. Li aĝas 78 jarojn. Li kapablas teksigi al silkraŭpoj ne nur paperon el la de ili ekskreciita silko, sed ankaŭ ventumilojn, litkovrilojn kaj veŝtojn. La lokanoj nomas lin "Dio de Silkraŭpoj".

Jam en sia infaneco Zhang tre interesiĝis pri bredado de silkraŭpoj kaj kulturado de morusarboj. Li iam lernis en la silkraŭpobreda kolegio de Jiangsu-provinco, post diplomiĝo revenis en la hejmlokon kaj tie laboris kiel instruisto pli ol 50 jarojn. Li ne kontentis nur pri lekcio laŭ lernolibro en klasĉambro, tial li gvidis siajn lernantojn ekspluati virgan teron, kulturi morusarbojn kaj konstrui scienc-esploran bazon kun areo de 9 hektaroj.

Laŭ la tradicia maniero oni nutras silkraŭpojn nur per morusfolioj. Post nutrado de unu monato la silkraŭpoj ekskrecias silkon 600-700 metrojn longan. Li atenteme pririgardis la vivkutimojn de la silkraŭpoj kaj trovis, ke ili ŝatas varmon kaj malŝatas trosekecon, tial li donas al ili vivkondiĉojn kun plej bona temperaturo kaj humideco kaj aldonas al ilia manĝaĵo freŝan lakton, vitaminojn k.a., por ke ili rapide kresku kaj ekskreciu pli longan silkon. Tiel la silkraŭpoj bredataj de li 18-25 tagojn povas ekskrecii silkon longan je 1 480 m.

Li trovis ankaŭ, ke ekskreciante silkon, la silkraŭpoj rampas antaŭen aŭ supren, kaj tiam la lumo kaj humideco estas gravaj por formiĝo de la kokonoj. Iutage lin subite lumigis la penso, ĉu oni povos ekskreciigi al la silkraŭpoj teksaĵon

laŭ la homa volo. En la komenco de la 80-aj jaroj li sin ekokupis pri tiu provo. Laŭ bionika teorio li alprenis la metodon "aranĝi plej taŭgajn temperaturojn kaj humidecon, doni plej bonan lumon en taŭga direkto kaj igi silkraŭpojn ekskrecii silkon en difinita loko." Li komandas la silkraŭpojn en navetado kaj post 5-jara penado li sukcesis teksigi al ili la unuan silkan paperon taŭgan por pentrado kaj skribado.



Zhang Tiannong kaj liaj silkaj ventumiloj



La ideogramo "Drako" skribita sur silkajo

Tamen la ricevita silka papero estas malegale dika, kio estas kaŭzita ĉefe de malegala kvanto de la ekskreciita silko kaj ritma diferenco de la ekskreciado far la virsilkraŭpoj kaj silkraŭpinoj. Zhang do faris al ili optimuman grupigon. Post alia 8-jara provado li ricevis silkan paperon kun egala dikeco kaj faris el silka teksaĵo ankaŭ ventumilon, veŝton kaj litkovrilon. La silkraŭpoj bone faris la randon de tiuj teksaĵoj.

Zhang petis kaligrafojn kaj pentristojn fari artan verkon. Iu el ili unustreke skribis ĉinan ideogramon kun la signifo de drako. Sur la papero tuj aperis drako kun klaraj

kapo, okuloj, spino kaj skvamoj. La efiko similas al tiu sur tradicia Xuan-papero destinita por ĉinstila pentrado, kaj plie la verko impresas tridimensie.

En 1995, gvidate de Zhang, la silkraŭpoj, ekskreciante paperon, sukcese teksis brilan lunon reliefan. Zhang petis pentriston kompletigi la artaĵon, kaj post tio aperis la bildo "Brila Luno", sur kiu estas krutaj montoj kaj belaj arboj sub la hela luno. En la 9-a Ĉina Foiro de Novaj Produktoj kaj Nova Teknologio Zhang gajnis la oran medalon per siaj verkoj, kiuj vekis admiron ĉe la vizitantoj.

En la sama jaro la silkraŭpoj teksis du reliefajn drakojn ludantajn globon sur silka papero 3.6 m longa kaj 1.2 m larĝa. Zhang petis kaligrafon fari 100 ĉinajn ideogramojn kun la signifo de drako, ankaŭ kiuj formis du longajn drakojn. Tiu trezora verko estas nomata Bildo de Cent Drakoj.

Por ĉiu artaĵo Zhang enfermis sin en domo de silkraŭpoj kaj serioze laboris, ĉar pro ajna malatento la silkraŭpoj fuŝus la artaĵon. Post kelkaj diurnoj li estis tiel laca, ke li ne povis sidiĝi post longa starado nek stariĝi post longa sidado. Lia edzino subtenis lin kaj en la lastaj 20 jaroj ili vivis ŝpareme por disvolvi novajn produktojn, kaj nun li heredigis la arton al sia filo, ankaŭ kiu studis en la silkraŭpobreda fakultato kaj post diplomiĝo sin ekokupis pri instruado. Por ke lia arto donu profiton al la loĝantoj, li organizis instituton por riĉigo per bredado de silkraŭpoj kaj preparis sin por fondi instituton de silkraŭpa teksado kun la deziro puŝi la teknologion al duonmekanikeco. Li faras penadon, por ke la silkraŭpoj teksu pli multe da artaĵoj.

Antaŭ nelonge li akiris lignon de sapio (*Sapium sebiferum*) kaj faris ĝin skeleto de ventumilo kaj teksigis al la silkraŭpoj grandan ventumilon 1.2 m altan.

Zhang senĉese laboris, kreis kaj kontribuis kiel senlaca printempa silkraŭpo. ■

# Taoisto sur floso

Tio estas arĝenta pokalo farita en formo de arbotrunko kun multaj branĉostumpoj kaj gajloj. Taoisto sidas sur floso, kun libro en la dekstra mano. La floso estis skulptita el arĝenta bloko. La kapo, mano kaj ŝuoj estis aljuntitaj post pretigo, sed nenia postsigno rimarkeblas. Sur la pobo estas gravuritaj la ideogramoj "Draka Floso", kaj sur la fundo — antikva poemo kaj la nomo de la aŭtoro.

La floso altas 18 cm. kaj longas 20 cm. Ĝi estas farita de Zhu Bishan de Yuan-dinastio (1206-1368) kaj nun konservata en la Muzeo de Imperiestra Palaco en Pekino.

La arĝenta floso montras la eminentan arton de la aŭtoro kaj la altan teknologian nivelon de la metio de arĝentaĵoj de Yuan-dinastio.





Akvofalo de Huangguoshu

Foto de LUO WENFA

ISSN 0032-4361



9 770032 436009

世界语《中国报道》一九九九年第十期  
(本刊代号: 二一九一五) 国内统一刊号: CN11 1339/G2